

ASISTILO

n° 12

Vintro 1992/93 Hiver



Revue de religion comparée bilingue (espéranto et français)
de l'Association Internationale d'Etude des
Enseignements Spirituels et Théologiques

ASISTI : Asocio de Studado Internacia
pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj
(faka kunlaboranta asocio de "Universala Esperanto-Asocio")



Naga

- * UN-a jaro de la indiĝenaj popoloj
- * Budho : ĉu katolika sanktulo ?
- * Fondo de T.I.M.E. : "Tutmonda Islama Movado Esperantista"



Islama komuna preĝo en moskeo



Vorto de la redaktoro

Bonan jaron al ĉiuj (...ankoraŭ jam "iomete" malfrue !), jaron dediĉitan de UNO al la indiĝenaj popoloj. Ni do inaŭguras ĝin per studoj pri la Sameoj (PIV-e Laponoj) kaj pri la Naga-oj kiuj vivas nord-oriente de Bharato (PIV-e Hindio, Baratio) ; kaj per traduko de Katar(ism)a teksto, la malaperinta religio de la Okcitanoj invaditaj de la francoj en la XIII-a jc. Sen forgesi la Tibetanojn kaj la Indianojn (en la artikolo pri Totemismo). Pri Ameriko vi cetere trovos sagan raporton pri ties malkovro antaŭ ĉ. 1000 jaroj, prelegon pri la Konferenco de la katolikaj episkopoj en oktobro okaze de la "500-jariĝo", kaj alvokon al la centjariĝa celebrado de la Monda Parlamento de la Religioj (kiu mem celebris la tiaman 400-jariĝon... !)

La temo de la IRKE en Valencio, post interkonsento kun nia prezidanto S-ro Yosimi Umeda, estos *"Libereco je kredo : kiel mi distingas toleremon disde indiferentemo - laŭ la personaj travivaĵoj kaj konvinkiĝoj"*.

Kaj ni jam ĝojas anonci unusemajnan ASISTI-seminaron en Ĉeĥio printempe 1994 (ĉirkaŭ pasko), kun temo : *"Kiel la religioj sin reciproke vidas - Kiel ili povas kunlabori"*.

Cetere ĉu iu povus reprezenti ASISTI en Hindio ĉi-somere (aŭgusto 1993) ? Temas pri (anglalingva) monda interreligia kongreso : Kiel eble plej rapide skribu al la redakcio. Dankon.

Fine ni gratulas niajn islamajn amikojn pro la fondo de *"Tutmonda Islama Movado Esperantista"*. Kaj deziresprimas bonan legadon al ĉiuj !

Organo de Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj (ASISTI)

Trimonata (krom somere)

Redakcio : 7 rue Parmentier, F-18000 Bourges (aŭ, nur ĝis 15-5-92, rekte al Ch. Lavarenne, Prestvannet St.Hjem D-120, N-9012 Tromsø)

Estraro de ASISTI : Yosimi Umeda (prez.), Ch. Lavarenne (sekr.-kas.), Bernhard Westerhoff (kunvenoj), L. Nordenstorm (Religia Antologio).

Directeur de publication : Christian Lavarenne

Jarabono 1993 : *triono de la UEA-individa abono ("MA")* : 90 ff/30gld/28DM/18\$... (kaj duonpreze por orienteŭropanoj, afrikanoj...) al -franca poŝtkonto "Asistilo, n-ro 10 421 77 R Marseille"

-norvega *postgiro* : "Christian Lavarenne, n-ro 0540.7849940"

-aŭ 50.000 zł. al Marek Krainki, ul.Albanska 28/2, PL-60134 Poznan

-aŭ UEA-konto "asis-r"

Subtena abono : ekde 120 ff, 40 gld, 35 DM, 25\$

Abonhelpa fonduso : pliaj abonoj laŭ la tarifo kiu validas por vi ; vi povas samtempe indiki adreson al kiu vi ŝatus ke Asistilo estu sendita !

ASISTI-kotizo 1993 : deviga por esti membro, kia ajn ĝi estu (sed minimume kvarono de la UEA-*"individa membro kun jarlibro"*-kotizo ("MJ") por okcidenteŭropo kaj nordameriko : 9 gld/ 30 FF / 8 DM...)

Subtenanta membro : ekde 150ff/50gld/45 DM...

ENHAVO

La Sameoj (Laponoj) kaj ilia antikva religio, de Prof. D-ro A. Nesheim (N)	p. 3
Renkonto de pastoro kun Lapona ŝamano, H. Hammond (N, XVIII-a jc)	p. 4
La dialogo inter religioj, Pastoro André Gounelle (F) - sekvo	p. 6
Leteroj : - Annegret Meyer (bahaanino, D)	p. 7
- Pastoro Christian Mazel, redaktoro de <i>Evangile et Liberté</i> (F)	p. 7
- Jaroslav Karhan, pri kunlaboro kun Int. Asocio por Religia Libereco (CS)	p. 8
100-jariĝo de la Parlamento de la Religioj : en Hindio, Mary Thenguvila	p. 8
Sagaoj : kristanismo en Groenlandon, malkovro de Ameriko (XI-a jc)	p. 9
La amerika rendezuo de la episkopoj en San-Domingo, F-ro Berten op (B)	p.10
Indiĝenaj popoloj : 2. La Naga-oj (nord-oriente de Hindio)	p.11
Tibeto : Hontindaj kondamnoj, "Alvoko", Domo "Esperanto" por infanoj ?	p.15
Leteroj : - Ĝen. Sekr. de la "Komitato de Subteno al la Tibeta Popolo" (CSPT)	p.16
- Ghislaine Bayod (pri islam-kristanaj paroj), red. de <i>Dialogue</i> (F)	p.16
Albanio : bona religia kunvivado laŭ la verkisto Ismail Kadare	p.16
Totemismo : kulto al nepersona spirita forto, el verko de Durkheim (F) - sekvo	p.16
Katar(ism)a ritaro (anonima manuskripto, XIII-a jc, okcitana)	p.18
Dosiero : - Sankta Budho, preĝu por ni !	p.19
- Vivo de "Barlaam kaj Josafat" (el la latina "Ora Legendo", XIII-a jc)	p.20
- La Travivaĵoj de Budho (el la sanskrita "Buddhaĉarita", I-a jc p.K. ?)	p.22
Konvertiĝoj al Islamo en Nord-Norvegio (laŭ intervjuo) - sekvo	p.26
Fondo de "Tutmonda Islama Movado Esperantista", (Irano)	p.26
Taŭhid 2. kaj 3. Celo de la kreado, Muhammad Kahraman (Turkio) - sekvo	p.27
Kolokvo pri minoritatoj en kristanismo kaj islamo, G. Berveling (NL)	p.28
Pri la "Preĝo de la Moraviaj Fratoj" : Propono de travivaĵo, D. Roulet (F)	p.29
BELa paĝo : Bahaa mondkongreso en Novjorko, BELaj Tagoj en Monki (PL)	p.30
La originalaj karakteroj de la Oomoto-doktrino, Icuki Deguĉi (J)	p.31
Kalendaro de renkontiĝoj / Anoncoj	p.32

Estas notinde ke la laponoj preferas nomi sin per la epiteto *sámi* (=lapona). Por proksimigi la esperantan nomon al tiu prefero de la laponoj, Prof. Asbjørn NESHEIM* proponis jenan formon:

Sameo (geogr.): Ano de ĉefgento loĝanta en **samelando**. **Samea**: rilata al **sameo** aŭ **samelando**. **Samelando**, **Sameio**: plej norda parto de Eŭropo, politike dividita inter Norvegio, Finnlando, Svedio kaj Rusio.

La Sameoj, civitanoj de kvar nacioj

La Sameoj estas malgranda etna grupo, kalkulata je nur 30.000 ĝis 40.000 individuoj**. Sed kiel Sameojn oni tiam kalkulas nur tiujn kiuj konservis sian samean lingvon aŭ karakterizajn sameajn kulturtraĵojn. Se kalkuli ankaŭ tiujn personojn el samea origino, kiuj lingve aŭ kulture asimiliĝis kun la najbaraj popoloj, la nombro tamen estas multe pli granda. Hodiaŭ la sameoj loĝas en la plej nordaj partoj de Eŭropo, dise en malgrandaj grupoj. (...) Oni kalkulas ke ĉirkaŭ duono el ili loĝas en Norvegio; [la resto en Svedio, Finnlando kaj Rusio].

Kvankam la sameoj estas tiel malmultaj, ili sukcesis konservi surprize multajn antikvajn kulturtraĵojn, kaj multaj el ili vivas konstante en proksima kontakto kun la naturmedio kaj ties rimedoj. Ĉasado kaj fiŝado ankoraŭ estas gravaj profesioj ĉe ili, kaj nomadaj sameoj ankoraŭ sekvas la boacaron dum ties migrado inter vintraj kaj someraj paŝtejoj.

Lingvo kaj prahistorio

La sameoj parolas finno-ugran lingvon proksime parenca al la finna. La sameoj kaj finnoj tamen estas tiel malsamaj laŭ fizionomio, ke estis konjektite ke la sameoj iam interŝanĝis iun "*prasamean*" lingvon kun tiu kiun la prapatroj de la finnoj iam parolis.

Tio tamen devas esti rigardata nur kiel hipotezo ne pruvita. Sed estas certe ke la sameoj, jam plurajn jarcentojn antaŭ la kristana erao, vivis en proksima kontakto kun la prapatroj de la finnoj.

La antikva religio de la sameoj

La religiaj konceptoj de la antikvaj sameoj, oni povas diri, ĉefe esprimis kredon je sendependa ekzisto de la animo kaj respekton kaj timon pri la prapatroj kaj pri la vivdonaj kaj detruaj fortoj de la naturo. La prapatroj, ili kredis, loĝas en certaj montoj hereditaj de la familio.

Inter la naturfortoj kaj fenomenoj ili kultis i.a. la tondron, la venton, la sunon kaj la lunon. Krom tiuj estis pli difuzaj fortoj, kiuj povis doni sukceson pri ĉasado kaj fiŝkaptado. Tiuj ofte estis manifestitaj en ŝtonoj de pli malpli stranga aspekto, al

kiuj ili faris oferojn. Apartan pozicion tenis la urso, kiu estis rigardata kiel duone homsimila kaj duone dieca.

Mediomo inter la homa mondo kaj la anima estis la ŝamano, la **noido*****. Tiuj ĉi estis homoj kun specialaj kapabloj denaskaj aŭ akiritaj per malsano aŭ komunikitaj de pli aĝa noido. La kapablojn konsistigis i.a. vizipovo kaj kapablo resanigi.

Sed eble la plej grava propreco estis ilia kapablo liberigi la animon de la korpo kaj fari vojaĝojn al la transa mondo por havigi konsilon kaj helpon aŭ por reporti animon de malsanulo. Tia vojaĝo estis ofte farata en eksteraĵo de besto. Alia grava propreco estis ke ili disponis vicon da helpantaj spiritoj kiuj i.a. akompanis ilin dum iliaj vojaĝoj al la transa mondo.

La vojaĝoj estis farataj dum la noido troviĝis en ekstazo, kiu estis atingita per longdaŭra tamburado kaj kantado de la ĉeestantaj membroj de la koncerna samegrupo vestitaj en siaj plej belaj vestoj.

La tamburo estis la plej grava helpilo de la noido. La tamburado estis pripentrita per figuroj simbolantaj la sunon, la tondron, la "ventvicon", diversajn bestojn, objektojn apartenantajn al la homa mondo, sed ankaŭ al la transa mondo k.t.p.

Antaŭ ol komenci la ŝam[an?]adon, malgranda "montrilo" el korno aŭ metalo estis metita sur la tamburledon, kaj la moviĝoj de tiu montrilo dum la tamburado estis prenitaj kiel aŭguroj. Oni povis per ili vidi ekzemple ĉu estis ŝanco por resaniĝo de la malsanulo aŭ al kiu naturforto oni faru oferon.

Kristana misio

La malnova samea religio bone konvenis por la vivmaniero kaj medio de la sameoj kaj montris grandan rezistforton kontraŭ la kristana influo. En izolitaj distriktoj (...) la ŝamana religio fakte estis en plena funkcio ankoraŭ en la komenco de la 18-a jarcento, eĉ se ankaŭ multaj kristanaj ideoj estis enmiksitaj (...).

En la daŭro de la 18-a jarcento ankaŭ tiuj pli malpli paganaj samegrupoj estis konvertitaj al kristanismo. Tiun konvertiĝon oni ŝuldas al la pastoro Thomas von Westen, "*la apostolo de la sameoj*". La konon kiun ni havas pri la malnova religio de la sameoj, ni ŝuldas pliparte al liaj intervjuoj de sameoj kiuj posedis kaj uzis la ŝamantamburon.

* En "La Laponoj de Norvegio kaj ilia historio", esperantlingva art. publik. en *Norvegio informoj*, Oslo, jan. 1985, "eld. de la Reĝa Norv. Minist. de Eksteraj Aferoj, por senpaga distribuo eksterlande" (petu "UDA 309 ESP").

** Ĉ. 70.000 laŭ U. Becker en *Esperanto*, dec. 1992, p. 210.
*** *Noaido* ĉe A. Nasheim, sed "*Noido*" ĉe von Westen.

Thomas von Westen

Thomas von Westen, de Trondhejm (la norvega ĉefepiskopa urbo), ankoraŭ ne estis 15-jara kiam li fariĝis studento en Kopenhago, kaj en nur du jaroj li sukcesis ricevi la licencion pri teologio (1699). Tiam li daŭrigis siajn studojn per lernado de orientaj lingvoj, lia celo estis fariĝi instruisto ĉe la universitato, sed la vojo estis barita.

Iam lia samĉambra kamarado sciigis al li ke la imperiestro Petro la Granda dungigis scienculojn por la nova Rusio. Kontrakto estis subskribita de la kolonelo Lange kaj Thomas pri posteno de profesoro pri la latina ĉe la universitato en Moskvo. Sed li havis grandajn ŝuldojn kaj liaj kreditoroj malpermesis al li foriri.

Thomas, *"konsternita, senhelpa kaj forlasita"* eniris preĝejon, preĝis Dion kaj ploris, lacega. *"Tiam li falis en dormon kaj dum la dormo okazis al li ke iu, kiel homo, alparolis lin tra sonĝo kaj diris: 'Iru al la virino ĉe numero 4 [de la strato aŭ placo] apud la preĝejo, tie ci estos savita'."*

La virino nomiĝis Anna Pedersdatter kaj estis 52-jara riĉa vidvino, kaj kvankam li estis nur 25-jara ili fianĉiĝis.

Li eldiris sian unuan predikon en 1708, kaj la reĝo mem ĉeestis ĝin. Li estis dungita ĉe la reĝa biblioteko. Kaj poste li estis nomumita kiel pastoro ĉe Veøy en Romsdal (Norvegio). Li edziĝis kaj foriris tien en 1711.

Li estis tre fervora pietisto kaj flama predikanto, ne hezitanta, ekzemple, nomi vilaĝon Sodomo... Baldaŭ li fariĝis la gvidanto de la "Plejado"*; kaj eĉ sendis petskribon al la reĝo por ke estu starigita komisiono pri taŭgaj studlibroj, instruistoj ktp.

En 1716 li estis enoficiigita samtempe kiel lektoro pri teologio en Trondhejm kaj *"vicarius"* [respondeculo] por la misio en Finnmark, la plej norda regiono de Norvegio, kie li vojaĝis dum la tuta somero, lerninte la samean kaj tiel malsupraĵe renkontante la homojn.

Jen la raporto pri lia unua interparolo kun samea ŝamano, en 1716: **la plej frua rekta atesto pri tiuj magiaj praktikoj ĉe la Sameoj**. Ni tradukas ĝin el la verko Den Nordiske Missions-historie: i Nordlandene, Finnmarken og Trundhiems..., Kiøbenhavn, 1787, (p.249-253), de la pastoro Hans Hammond, lia bofilo, kiu kompilis ĝin el liaj notoj.

* *"Syvstjernen"*, rondo de sep pastoroj provantaj reformi la lokan kristanaron.

Rakonto de noido

Dimanĉon, la 2-an de aŭgusto [1716], la Lektoro [von Westen] celebris mem la tutan diservon en la preĝejo de Talvik, antaŭ ĉeestantaro de "Finnoj"(1). Post kiam la preĝoservo estis finita, li komencis ekzameni kaj informiĝi pri la superstiĉo (2) de la Finnoj. Ĉi tie la Lektoro trovis kion li suspektis, du kurioze fortajn noidojn. La unua fine konfesis pri sia magio, ke li mortigis dek unu homojn, preskaŭ ĉiujn Laponojn (3); kaj pri ĉiu el ili li indikis la nomon, kun ĉiuj cirkonstancoj de ilia kulpo kontraŭ li. La noido plu rakontis kion da tagoj aŭ horoj ĉiu estis malsana antaŭ ol morti, same kiel la manieron laŭ kiu li alvokis kaj petis helpon de sia "noido-gadse" (4) (kiun tiu ĉi noido nomis Zidse), ekstere sur la kampo, kaj ordonis al ŝi puni tiun kaj tiun, kontraŭ kiu li koleris.

Tiu magi-majstro estis la unua, de kiu S-ro Lektoro von Westen ricevis informojn pri la imaga (*) kuniĝo de Sameoj kun diablaj spiritoj;

(*) Mi intence skribas "imaga kuniĝo", sen timi la akuzon pri malkredado. Kiom da procesoj pri sorĉado malhonoris Eŭropon ĝis la komenco de tiu ĉi jarcento [la XVIII-a]! Kiom da homoj estis bruligitaj vivaj pro kulpoj kiujn ili faris aŭ plagoj kiujn ili provokis, laŭ sia propra konfeso, el kiuj la plejparto kaj la plej gravaj estis absolute neblaj. La kompatindaj homoj kredis mem ke ili faris ĉion ĉi, kaj kion ne povas kredi ekscitita, senorda, konfuzita imagipovo? Ĝi vidas, aŭdas kaj sentas aĵojn kiuj neniam ekzistis, jes ne povas ekzisti. En Vojaĝo tra okcidenta Nordland ĝis Lapmark (5), de Ehrenmalm, la germana traduko de 1748, p. 418, aldonas la Priskribo(n) pri la sveda Lapland de Høgstrøm, kie estas priskribita la imagipovo de la Sameoj kiel nekredeble forta, ĉar nekutima ektimigo povas igi ilin eĉ sveni (...). De tiu imagipovo, diras Ehrenmalm, kaj kredas ja tion ĉiu ajn kiu havas sanan prudenton kaj ekzamenas la aferon filozofie, devenas ilia ekstazo, kiam ili batadas sian magian tamburon aŭ *"Runebomme"*. Ilia inklinado al la superstiĉo, ilia abomeno esti superregitaj (...), same estas fortaj pruvoj pri forta dono de imagipovo. De tio oni konkludas, li plu diras, ke kun severeco nenio estas farebla ĉe tiu popolo. Male, Sameo povas, kun la bonkoro kaj mildeco, esti kondukita kien oni volas; ĉar ili volonte aŭskultas admonojn kaj facile komprenas ilin kiam ili fariĝas konvinkitaj ke tio okazas en bona intenco. Oni povas kredi tion, kion blasfemulo mem kredas el la tuta koro, ke li rajdis al sabatorgio sur balaila bastono, kaj transŝipis la oceanon sur akriĝoŝtono! Sed ke tio reale okazis, kredas ja neniu prudenta.

ĉar li rekonis (kaj mi skribas kiel *historicus* (6) kion mi trovas notitan) havi *spiritum succubum* (7), Touto aŭ Tonto, sub formo de virino en sia servo; sed priskribis ŝin, *quoad mutuos amplexus* (8), malmola kiel ŝtono ; kial do peko kaj superstiĉo povas perversigi ĉiujn dispoziciojn de la ĉielo en la plej alta grado ? Kiel profunde ni devas danki Dion pro la lumo de lia *Evangelium* (...) De la sama noido la Lektoro ankoraŭ unuafoje sciiĝis kian ekstreman plezuron Saiwo kaj la Sarakino (*) havus en la ofero de hundo, kaj ke tiuj ĉi bestoj estis oferitaj strange okaze de la akuŝdoloroj je malvivaj infanoj aŭ je filinoj ; sed ! tiam la hundo devis esti enterigita viva.

(*) Tiu ĉi Sarack estis adorita de la norvegaj sameoj kaj estis nekonita en la sveda Lapmark. Ĉiu provinco, jes ĉiu urbo havis siajn proprajn diojn en la antikva Egiptio (...) Eble, kiel ĉiu Lapmark havas sian propran dialekton, same ankaŭ siajn proprajn falsdiojn, aŭ la saman sub diversaj nomoj ; la klera Høgstrøm, misiisto kaj pastoro en Gelliware, en sia Priskribo de la sveda Lapland, 11-a (9) ĉap., § 6, diras: Ke ankaŭ la sameoj kredis je la unu, kiun ili nomis la Sarack, tion la kara dana profesoro Thomas von Westen raportis, kaj samtempe priskribis tiun falsdiĉon ; ŝi estis tiel konata ke en iuj Lapmark-oj oni uzis la vorton *saragads* kiel *nomen appellativum* (10) anstataŭ *creator* (11) ; ĉe Kaiton oni havas la vortojn Kreinto kaj kreit[ar]o, nome Seundie kaj seundet ; sed Sarack ne estas nekonata, plu diras Høgstrøm, ĉar kiam oni demandis al iuj, kiu estis kreinta la mondon, ili respondis Sarack ; li ne povis havigi al si iun ekzaktan koncepton pri tiu persono, de la diroj de la sameoj ; laŭ la raportoj de aliaj, li malkovris ke ili tenas la Sarack por *natura naturans*, sed tamen diferenca de Dio, kaj ke la Sarack estis efika sur la naskiĝon, la prosperon kaj la bonfarton de homoj kaj aliaj kreitaĵoj, kaj do povis esti enkalkulita inter iliaj malnovaj falsdioj ; sekve, de tiu vorto (...) la norvegaj sameoj formis falsdion kaj forĝis la konceptitan, propran sencon de la vorto (...)

Li aldonis ke dank'al lia arto multaj estis kuracitaj de malsanoj kaj aliaj afekcioj ; kaj ke li estis nur dekdu-jara kiam li komencis divenadi kaj ekhavis noido-gatse-ojn , tre frua komenco ; en nia epoko, kiam la edukado ne nur estas ĝenerale neglektita (...) la homoj sin liveras ankoraŭ pli frue al la regado de la Malbono kaj de Satano.

Notoj

- 1/ Ĉi tie, malnova nomo de la Sameoj.
- 2/ Vidu la unuan ekzemplon de uzo de tiu vorto en PIV : "ofte inter superstiĉo kaj kredo estas diferenco nur de vidpunkto". Kompreneble ni, nun, konscias pri tio ; sed ĉi tie temas pri raporto fare de kristana pastoro komence de la XVIII-a jc. Eĉ se ni ne plus akceptas tiajn esprimojn ni devas en lojala traduko respekti ilin.
- 3/ Ĉi tie la vorto est "Lapp(er)" ; pli supre, estis "Finn(erne)". Ambaŭ estas norvegaj (kaj danaj) sinonimoj de la nuna norvega nomo "Same", kiu estas ilia propra. Probable ne estas speciala nuanco inter ili, nur tempa sinsekveco en ilia kutima uzado: "La malgranda popolo kiun la norvegoj de antikvaj tagoj estis nomintaj "finner", kiu poste nomiĝas "lapper", kaj kiu nun preferas esti nomataj "samer". (Ivar WELLE, Norges kirkehistorie, Oslo, 1948, p.114). Poste ni do tradukos ĉiujn indiferece per Sameoj.
- 4/ Oni komprenos pri kio temas plu legante.
- 5/ "Laponlando" : komparu kun Danmark.
- 6/ Latina vorto : historiisto.
- 7/ Demonino kiu nokte venas "kuniĝi" kun homo.
- 8/ Latino : "Rilate la reciprokajn brakumojn" (?)
- 9/ Aŭ : "II-a" ?
- 10/ "Komuna(n) nomo(n)".
- 11/ Latino : "Kreinto".

(sekvota)

Nuntempa situacio

(...) De granda intereso estas la samea popola kantmaniero, la "jojko". Ĝi evidente konservis siajn tre antikvajn trajtojn en sia formo kaj strukturo. La vortoj ofte ludas subordigitan rolon kompare kun la melodio kaj la ritmo. La jojko povas havi kiel temon preskaŭ ĉion ajn, kio interesas aŭ vekas aflikton aŭ ĝojon. Povas esti persono, la boacaro, bela naturo, k.t.p. En Finnmark ĉiu sameo havas sian propran jojkon, kaj la rememoro pri mortintoj povas esti konservata viva per ilia jojko.

(...) La samea lingvo kaj kulturo estas plej bone konservitaj ĉe la montosameoj. Sed ankaŭ ĉe ili la modernaj impulsoj kontribuis al malfortigo de la tradicioj. (...)

Fundamenta demando estas, nun kiel antaŭe, la lingvo. Sur tiu kampo gravaj progresoj okazis de post la lasta milito. Oni devas menciigi ke la samea, de 1967, estas enkondukita en la instruadon (...)

Se oni esceptas la religian literaturon, la samea lingvo ĝis nun estas malmulte uzata kiel literatura esprimilo. (...)

Norda Samea Instituto, fondita en 1973 (...), havas kiel taskon engaĝi sameojn por esploro kaj konservo de la sameaj kulturtradicioj kaj rajtoj.

La dialogo inter

4-a tezo : Ĉiu religio, por resti viva kaj vera, bezonas kritikadon.

La kritikado vivtenas la internan polemikon pri kiu mi parolis fine de la 3-a tezo* . Tiel ĝi malebligas la religion droni en idolistecon (...) Kritikado implicas samtempe komunion** kaj proteston, partoprenon kaj interpelacion.

Ĝi konservas la distancon inter la revelacio kaj la religiaj strukturoj, sen nei la rilaton inter ili. Ĝi kontraŭstaras la absolutigon de la mitoj, ritoj, dogmoj aŭ institucioj, montrante ke temas pri relativaj kaj neperfektaj esprimoj. Ni pensu, ekzemple, pri la biblia kritiko kiu starigas la plej fortan, la plej potencon obstaklon kontraŭ tiun alSkriban idolistecon kies allogo naskis la fundamentismon.

Tamen, kritikado entenas grandegan danĝeron ĉar ĝi riskas detrui la signifajn strukturojn, kiuj estas necesaj. Oni devas, se mi rajtas tiel esprimi min, kritiki la kritikadon, por ke ĝi ne forigu la sencon atakante la literon.

Mi emus distingi kvar specojn de kritikado.

Unue la mistikan kritikadon, kiu senkreditigas la rimedojn, la perantojn (la klerikaron, ekzemple, aŭ la sakramentojn), por substreki ke nur gravas la rekta renkonto kun Dio ; la rito ne anstataŭigas ĝin nek aŭtomate kaŭzas ĝin. Tiu kritikado degeneras kiam ĝi falas en la mistikism[ac]on kiu pensas ke la rilato kun Dio senpere estiĝas, sen iu rimedo nek ilo, sen figuroj nek simboloj. Prave tamen ĝi memorigas ke la dogmoj, la ceremonioj kaj institucioj estas iloj akcesoraj kaj relativaj rilate la celon.

Due la etikan kritikadon, kiu stariĝas kontraŭ la premado de la homo nome de la sankto. Ĝi protestas ekzemple kiam la religio sanktigas la maljustecon, kiam ĝi fariĝas servanto de la malnova ordo anstataŭ kontribui skui ĝin kaj ĝin transformi, kiam ĝi predikas akceptadon kaj rezignacion. Tiu kritikado degeneras kiam ĝi provas forigi ĉiun religian institucion, aŭ kiam ĝi reduktas la fidon al nure sekulara etika agado. Tamen ĝi pravas kiam ĝi memorigas ke la religiaj strukturoj devas favori la liberiĝon de la homo kaj kontraŭstari ĉiun premadon.

Trie la racian aŭ sciencan kritikadon, kiu pridubas la ekzaktecon de la doktrinaj asertoj de la religiaj instruoj, kiu rivelas la neadekvatecon de niaj konceptoj rilate la originan revelacion kaj ankaŭ rilate la nuntempan mondon, kiu montras la relativecon de niaj sanktaĵoj. Tiu kritikado degeneras kiam ĝi falas en nuran racionalismon malplenan je ĉiu religia substanco, en spiritualisman humanismon kiu ne plu vidas ke profunda senco pasas tra neperfektaj formoj. Prave tamen ĝi daŭre postulas koherecon kaj kompreneblecon, ĝi rifuzas ke oni oferu verecon kaj rigorecon de la penso al pieco.

Kvare, la profetan kaj teologian kritikadon, kiu, nome de la transcendeco de Dio, protestas kontraŭ kio volas enfermi lin, lin ĉirkaŭbari ("enclore") kiel diris Kalvino ; ĝi kontestas ĉion kio pretendas prezenti lin, figuri lin. Ĝi defendas la suverenecon kaj liberecon de Dio. [Tiu kritikado degeneras kiam ĝi forgesas ke Dio***] parolis pere de vortoj kaj eventoj, kaj ke li rivelacias sin al ni en precizaj formoj.

Tiu kvarobla kritikado ne celas la forigon de la religiaj strukturoj. Ĝi klopodas relativigi ilin, restigi ilin en ties ĝusta loko kontraŭ ĉiu pufiĝo. Ĝi ne atakas ilin por ilin detrui sed male por rekonduki ilin al ties vereco (...)

5-a tezo : Viva kaj konstruiva dialogo inter malsamaj religioj implicas ke oni rekonu samtempe la verecon kaj la mankecon de ĉiu religia strukturo. Tiu dialogo celas favori per reciprokaj pridemandado kaj konfrontado la internan memkritikadon de ĉiu religio.

Tiu tezo havas du partojn. La unua temas pri la kondiĉoj, kaj la dua pri la celoj, de la dialogo.

Unue pri la kondiĉoj. La dialogo memkompreneble ne povus okazi, kaj havus **neniun sencon, inter dialogantoj kiuj estus konvinkitaj esti mem tute pravaj**. Kiam oni kredas ke oni posedas la ekskluzivon de la vero, kaj oni opinias ke nia partnero estas tute en eraro, oni provos konvinki lin, lin konverti, ne aŭskulti lin aŭ interŝanĝi [ideojn] kun li.

Oni havos, plejbonkaze, sintenon gvidatan de certaj etikaj principoj (rifuzo, ekzemple, de persekutado aŭ de uzo de perforto, respekto de ĉies rajto vivi laŭ siaj konvinkoj), sed ne teologian aŭ religian solidarecon. Por ke la dialogo vere eku, estas bezonata reciproka rekono kiu akceptas, almenaŭ principe, ke la alia povas esti portanto de parolo de Dio por ni.

Sed ankaŭ ne estas dialogo se oni cedas al la alia aŭ se oni rifuzas eniri en diskuton kun li, se oni ne montras sian propran identecon, se oni ne esprimas sian alrilaton, se oni evitas la konfrontadon. Ĉiu dialogo implicas "dialektikan unuiĝon de la akcepto kaj de la rifuzo" (Tillich). Ĉiu devas lasi sin interpelacii, kritiki kaj pridemandi de la alia, kio implicas ke li rekonu la relativan mankecon de siaj religiaj strukturoj. Ĉiu same devas interpelacii, kritiki kaj pridemandi la alian, kio implicas ke li konsciigu prezenti kaj defendi, ankaŭ li, veraĵon.

* Vidu Asistilon n-ran 11, p. 4 .

** Pri tiu vorto kaj ties signifo vidu noton en la artikolo pri totemismo, sur p. 17 .

*** Ni konjektas ke tia frazero estis preterlasita de la redaktoro.

religioj (sekvo)

La dialogo formiĝos nur se oni konscias, kiel ni diris en le dua tezo, ke ĉiuj religioj estas fundamentitaj sur revelacio, ke do ili ĉiuj estas parte ĝustaj; kaj aliflanke, kiel ni diris en la tria tezo, ke ĉiuj misformigas sian revelacion, pli malpli perfidas la veron de Dio, kaj do ke ili estas parte malpravaj. Tiu miksaĵo el dubo kaj certeco kreas la eblecon de vera diskuto kie oni engaĝiĝas kaj kiu vere koncernas nin; se ne, tio estas nur retorika ludo.

Post la kondiĉoj de la dialogo, ni alvenu al ties celo. Mi kredas ke oni devas rifuzi kaj forpeli du eblajn celojn.

Unue ni devas forlasi ĉian sinkretisman celon. Ne temas pri unuigi aŭ kunfandi la diversajn religiojn. Mi ne kredas je universala religio formita de la alportado kaj miksaĵo de la apartaj religioj. Oni povus konsideri tian eblecon se almenaŭ ĉiuj religioj dependus de sama revelacio; la celo tiukaze estus ke ĉiuj revenu al la pureco de tiu revelacio. Sed, mi jam diris tion komentariante la duan tezon, mi ne kredas ke ekzistas universala revelacio, la sama por ĉiuj. Laŭ mia sento, estas multege da apartaj revelacioj kiuj havas ĉiu sian neredukteblan specifecon.

Se oni ne respektas la originalecon de ĉiu religio, se oni provas forigi kio apartenas propre al ĝi, kio distingas ĝin de la aliaj, oni malplenigas ĝin je ties substanco. Oni cetere retrovas en tio ĉi ion kion mi malkovris en la dialogo inter katolikoj kaj protestantoj. En unua fazo, oni opiniis ke oni devas provi forigi la diferencojn; hodiaŭ oni celas ne malaperigi ilin, kio estus perdo, sed lerni bone uzi ilin.

Due, sed tio probable estas evidenta, **la dialogo ne devas havi kiel celon la konverton de la alia**, ĉiukaze ne en la kutima senco de la vorto konverto. Jes ja, se la partoprenantoj en la dialogo konvertiĝas al Dio, kion ni ĉiam bezonas, oni sin [inter]-gratulos kaj tio estos pozitiva rezulto de la dialogo. Sed se oni provas varbi aliĝantojn por la religio al kiu oni apartenas, tiam la dialogo misvojiĝas kaj devojiĝas. Ĝi konfuzas simbolan sturkturon kun kion tiu ĉi signifas kaj celas. Ĉe Internacia Asocio por Religia Libereco (IARF), principe, oni rifuziĝas je ĉiu prozelitismo kaj mi scias ke estas same ĉe Jud-Kristana Amikeco. Kiam la kredantoj, kaj tio ofte okazas en kristanismo, reduktas sian mision al entrepreno de konvertado, mi kredas ke ili perfidas ĝin, kaj igas sin nekapablaj ĝin plenumi.

Kion do oni esperu el la dialogo? Mi respondas al tiu demando citante du protestantajn teologojn. La unua, la germano Ernst TROELTSCH, mortinta en 1920, diris ke la renkonto inter religioj devus ebligi *"reciprokan fekundigon"*.

La dua, la usonano John COBB, parolas pri *"reciproka kreativa transformado"*. Ŝajnas al mi ke tiu transformado aŭ tiu fekundigo havas du flankojn.

Unue, la konfrontado devus devigi ĉiun pripensi pri sia propra religio, kaj profundigi ĝin, ĝin pli bone kompreni. Ĝi igos lin **malkovri erojn el sia propra revelacio** kiujn li preterpasis. Ĝi foje ebligas prunteprenojn kaj plilarĝigojn.

Poste, kaj ĉefe, mi kredas ke la konfrontado devas vekti, disvolvi, favori **kritikan sintenon kontraŭ si mem**. Ŝajnas al mi ke ni devas esti ege atentemaj al kio ĉe ni vekas obĵetojn aŭ rezistemon de la alia, kaj ni devas tre serioze trakti ilin, demandi al ni ĉu ili estas fundamentitaj. Mi antaŭe substrekis, kaj mi reparolos pri ĝi, la gravecon de la kritikado; nu, ofte, kion diras la aliaj al ni, tio montras al ni niajn mankojn, niajn difektojn, niajn devojiĝojn; sen ili ni ne ekkonscius pri ili. En tiu senco **oni devas scii diri niajn malakordojn**; ni multe pli utilos unuj al la aliaj tiel, ol insistante pri niaj punktoj de akordo.

Leteroj

La 15-an de junio 1992

Kara Christian!

(...) Kun grandega intereso mi legis la artikolon de Pastoro A. Gounelle, daŭrigotan. Kiel Bahaanino mi jam delonge laboras ĉe WCRP (Monda Konferenco de Religioj por Paco), tio estas monda movado en kiu kunlaboradas la ses plej grandaj religioj.

Mi neniam aŭdis pri I.A.R.F. . Kio estas ties tasko aŭ celo? Aŭ rilato al WCRP? Ĉu iu povas respondi? Bonvolu... **Annegret MEYER (D)**

Le Lubéron, la 10-an de jan. 1993

Kara kolego,

(...) Unue, grandan dankon pro via intereso por "Evangile et Liberté", pro via partopreno en ties diskonigo, pro via amikeco kiu esprimiĝas per via letero kaj agado.

Por havi precizajn informojn pri IARF, la plej taŭge por vi estas turni vin rekte al la ĝenerala sekretariejo kiu volonte respondos al vi kaj donos al vi ĉiujn deziratajn informojn. La sekretariejo respondos al vi pri via ebla kunlaborado kun IARF.

Adreso: Dreieichstr. 59, D-W-6000 Frankfurt. (...) Mi deziresprimas ke nia kunlaborado disvolviĝu. Via agado interesas nin. Ĝi kuniĝas kun la nia. Ni estas ĝojaj konkretigi tiun "batalfratecon", pacan. Tute frate en tiu komunio de fido kaj espero.

Pastoro Christian MAZEL (F)
(Red. de Evangile et Liberté, el kiu ni tradukis la ĉi-supran prelegon de Past. André GOUNELLE).

Monda parlamento de la religioj

100-jariĝo celebrotita en Bharato

Dum la IARF-kongreso, la 1-an de aŭgusto 1990 en Hamburgo (D), projekto estis ellaborita por organizi vastan Kongreson en Bangalore (Hindio) lige kun la celebrado de la centjariĝo de la Monda Parlamento de la Religioj : la unua sesio de tiu Parlamento okazis en 1893 en Chicago [Ĉikago, Usono].

En aprilo 1988 kvar internaciaj interreligiaj organizoj decidis kune labori :

- Internacia Asocio por Religia Libereco (IARF, Frankfurto, D) ;
- La Templo de la Kompreno (Novjorko, Usono);
- Monda Konferenco de la Religioj por Paco (WCRP, Ĝenevo, CH) ;
- Monda Konferenco de la Religioj (Londono).

Tiu ĉi komuna manifestado okazos en aŭgusto 1993, pri la temo "Al kunlaborado inter la diversaj religioj en la 21-a jarcento". Ĝi estos prezidata de Punyabrata Roy Choudhury, la unua prezidanto de IARF, hinddevena.

La organizantoj esperas ke loke kaj regione estos iniciatitaj agadoj por kuraĝigi homojn de diversaj religioj renkontiĝi kaj transpasi maltoleron kaj amarecon. Per tiaj agadoj ili atendas kaj laboras por la tago kiam estos forigitaj la malbenoj de milito, malriĉeco kaj maljusteco, same kiel la minacoj por nia tera loĝejo. (La Baptistoj de la tiama Sovetunio skribis al IARF : "Kune kun vi ni kredas ke la pluvivo de nia planedo dependas de la realiĝo de nia unueco".)

IARF : Dreieichstrasse. 59, D-W-Frankfurt 70.

El *Evangile et Liberté* (Evangelio kaj Libereco), februaro 1991 (105-a jaro), p.13 . Administranto (senpagaj provnumeroj) : Robert NOUGAREDE, 18 rue Aristide Briand, F-94100 St-Maur des Fossés (Francio).

Ĝia historio laŭ Ekumenismo*

(Hodiaŭ kutime oni agnoskas en katolika teologio ke ne-kristanaj religioj estas iloj aŭ okazoj kiujn Dio uzas por komuniki sian gracon kaj ricevi respondon de la homoj. Oni supozas ke tio ĉi estas premisoj kiuj ebligis la tagon de Asizo je la 27-a de oktobro 1986, oficiale organizita de la Katolika Eklezio.)

Antaŭ 100 jaroj, de la 11-a ĝis la 28-a de septembro 1893, M-ro Keane, rektoro de la Katolika Universato en Washington [Ŭaŝintn], kaj la Episkopo Ireland (Usono), okaze de la 400-a datreveno de malkovro de Ameriko, organizis en Chicago la t.n. Parlamenton de la Religioj, kun reprezentantoj de religioj el la tuta mondo, venigitaj de Hindio [Swâmi Vivekânanda], Ĉinio, Japanio, Persio, Palestino kaj aliaj landoj.

La celo estis doni lecionon al la tuta mondo, demonstrante ke la Providenco permesis enmigradon al Ameriko el ĉiuj nacioj por ke tie miksiĝantaj, ĉiuj popoloj vivu frate, sen malamo, kontraŭeco kaj ĵaluzo en granda florado de karitato ; ĉar se ne eblas interkonsenti pri kredoj, oni povas tamen tuj akordi pri karitato.

La leciono estis precipe donata al la Kristanoj : por ami Dion, ne necesas malami la fraton, kiu ne opinias kiel ni. Ĝis tiam oni pretendis ke la fondintoj de la paganaj religioj estis senditaj de la diablo por adoptigi al la homoj trompaĵon. Kontraŭe oni devas opinii ke Dio mem estigis ĉe la paganoj majstrojn kiel Budhon, Konfuceon, Zoroastron, Sokraton, verajn ilojn de sia dia Providenco. Ili vidis nur parte la veron, miksitajn al malvero, faris kiel eble plej bone, kaj ni devas omaĝi al ilia bona volo kaj al ĉio kio bona kaj bela estas en ilia instruo.

La motivoj ŝajnas justaj kaj oni esperis ke la tagoj de la Parlamento de la Religioj estos signantaj etapoj survoje de la homa historio. Sed la tempoj ne estis ankoraŭ maturaj, kaj la Papo Leono la 13-a intervenis per la letero "*Testem benevolentiae*", kondamnante la Parlamenton de la Religioj ; kaj de tiam ĉio malaperis [ĉe la katolikoj].

(Sed en 1986 la situacio estis alia, ŝanĝita eĉ en katolika medio, kaj (...) permesis ke okazu la tago de Asizo, t.e. renkontiĝo de Kristanoj, Sikhoj, Hinduoj, Islamanoj, Budhanoj, Konfuceanoj, Parsioj, Ĝainistoj, Ŝintoistoj, Indianoj : Tupi-Gŭaranoj...)

* Mary THENGUVILA, en n-ro 21 (junio 92), p.348 (Admin.: P. Zivny, Anenské nám. C.1, CS-11000 Praha 1).

Letero

Olomouc, 27.6.1992

(...) Eble jam por tiu ĉi kongreso ASISTI povus proponi kunlaboron. Fakte dum tiuj kongresoj ofte estas - laŭ esprimo de pastoro A. Gounelle - "*mal-facilaj sed ĉiam fascinaj dialogoj*" inter plej diversaj religianoj. Ĉiam regas strebado pri baza, unueca, religia mondrigardo. (Pri la kongresoj de IARF mi ĉiam estis informita de la prezidanto de nia landaj unitarianoj, kiuj partoprenadis ilin. Laŭ liaj informoj mi raportadis en la rubriko "*Ekumena Voĉo pri Paco*" en Paco).

Al IARF mi faris diversajn proponojn jam por ties kongresoj en 1987 kaj 1990, sed ĉar ili estas faritaj de unuopulo, la estraro de IARF ne dediĉis atenton al ili. Krome la oficiala lingvo de tiu kongresoj estas la angla kaj tial la kongresanoj ne emas dediĉi atenton al esperanto (...)

Jaroslav KARHAN (CS)

Kristanismo en Verdlandon" kaj 900- aŭ 1007-jariĝo de la malkovro de Ameriko

Pluraj saga-oj raportas tiun historian eventon (pri kiu ni nur aludis en nia antaŭa numero), kun precizaj priskriboj de tiu nova lando kie vikingoj pasis plurfoje la tutan vintron (en Labradoro, Novlando, Nova Skotio*, aŭ probable eĉ iom pli sude). Eĉ episkopo, M-ro Erik**, ekŝipis en 1221 al Vinlando.

Kiam dek ses vintroj estis pasintaj de post la tempo kiam Erik la Ruĝa transŝipis [de Islando] por vivi en Verdlando [Groenlando], Leif, lia filo, vojaĝis de Verdlando ĝis Norvegio : li venis al Trondhejm en la aŭtumno kiam Reĝo Olaf Tryggvason*** revenis de la nordo de Halogaland [en 999]. Leif stiris sian ŝipon en Nidaros kaj iris rekte al Reĝo Olaf. La reĝo predikis la kredon al li kiel li faris al aliaj paganaj homoj kiuj venis al li. La reĝo havis facilan taskon kun Leif, kiu do estis baptita kun sia tuta ŝipano; Leif restis kun la reĝo dum la vintro, kaj estis lia gasto.

La reĝo traktis lin kun honoro, videble rekonante ke li devas esti homo de bona familio. Iun tagon la reĝo parolis al Leif kaj diris : "*Ĉu vi intencas foriri al Verdlando tiun ĉi someron ?*"
- "*Jes*", diris Leif, "*kun via konsento*".
- "*Mi opinias ke tio estas bona*", respondis la reĝo, "*vi iros kun mia misio, kaj predikos Kristanismon en Verdlando*". Leif diris ke li konsideros tion, sed aldonis ke li pensas ke tia misio ne havos facilan taskon en Verdlando. La reĝo tamen diris ke li konas neniun pli taŭgan por tio ol lin, aldonante : "*Vi alportos al ĝi bonŝancon*". - "*Se estas tiel, la bonŝanco venos nur de vi*", diris Leif.

La reĝo disponigis al li pastron kaj aliajn sanktajn homojn por bapti la homojn kaj instrui al ili la veran kredon.

Leif enŝipiĝis kiam li estis preta. Li drivis sur la maro dum longa tempo kaj hazarde malkovris landojn kies ekziston li neniam supozis antaŭe****. Estis sovaĝaj tritikokampoj tie, kaj vin-arbedoj kreskantaj*****. Estis ankoraŭ tiuj arboj kiuj estas nomitaj "mösür" ; kaj ili prenis specimenojn de ĉiuj tiuj aĵoj. *Iuj el la arboj estis tiel dikaj ke ili estis uzotaj por domkonstruado.* Leif trovis homojn sur ŝipruino kaj prenis ilin hejmen kun si kaj loĝigis ilin ĉiujn dum la vintro.

Li elmontris la plej grandan afablecon kaj kura-

ĝon en tio ĉi, kaj en multaj aliaj manieroj, ĉar li enkondukis Kristanismon en la landon [Groenlando], kaj savis la homojn ; kaj poste li ĉiam estis nomata Leif la bonŝanca.

Leif alteriĝis en Erikfjordo kaj poste hejmeniris al Brattahlid kie li estis bone akceptata. Li baldaŭ komencis prediki en la lando Kristanismon kaj la Katolikan Fidon, kaj publikigis la mesaĝon de Reĝo Olaf Tryggvason, kaj diris kiaj grandaj gloro kaj trezoro akompanas tiun kredon. Erik estis malrapida forlasi sian religion, sed Thjodhild [lia edzino] estis baldaŭ konvertita kaj ŝi konstruigis preĝejon, kvankam ne en la tuja proksimeco de la domoj, kiu estis nomata Thjodhilda Preĝejo : tie ŝi kaj ŝiaj konvertofratoj, kiuj estis multaj, kutimis suprenoferi siajn preĝojn.

Notoj :

Nia teksto baziĝas sur tradukoj de 3 manuskriptoj :
- La Sagao pri Eriko la Ruĝa, kopio farita komence de la XV-a jc. de versio verkita fine de la XIII-a ;
- La Libro de Hauk, alia versio, verkita kaj skribita de tiu ĉi inter 1299 kaj 1334 (dato de lia morto). Tiuj du versioj venas de komuna originalo, verkita ĉ.1200.
- La Libro de Flatey, (Flateyjarbók) kompilita inter 1370 kaj 1387 ; la parto kiu interesas nin estis skribita de la kopiisto John Thordson.

Vinlando estis unufoje menciita en la Descriptio de Adam de Bremen, laŭ rekta diro de la dana reĝo Svein Estridson (kiu mortis en 1076) ; kaj poste en la Islandíngabók kaj la Landnámabók de Ari la Erudiĉiulo, naskiĝinta en 1067.

Pri la tuta demando, vidu G.M. Gathorne-Hardy, The Norse discoverers of America : The Wineland Sagas, 2-a eld., Oxford : Univ. Press, 1970, 304 p. (eĉ kiuj ĉ. 70 da tekstoj, kaj bibliografio). Krome, en la franca ekzistas premiita historia romano por junuloj verkita en la 1950-aj jaroj, probable titolita "Le fils d'Eric le Rouge" aŭ io tia... La unua, hezita, moderna rekono de la fakto troviĝas en Moulton kaj Yates Hist. of the State of New York, 1824.

* Nova Scotia. Cetere ni mencias, parenteze, ke sude de ĝi estas **esperantista insuleto**, Akvonezio (ĉ.1,5 km longa k 0,5 km larĝa), "*loĝata nur de esperantoparolantoj*" (do almenaŭ 2,ĉu daŭre?) : **Aquonesian Island**.

** Episkopo de Groenlando, kiun oni ne devas kon-fuzi kun Eriko la Ruĝa, la fondinto de la kolonio en Verdlando, malkovrata kaj nomata tiel de li en 982.

*** Ne temas pri Sankta Olav (Olaus), reĝo kaj martiro (en 1030), kiu nomiĝis Haraldsson.

**** Fakte **Ameriko estis jam malkovrita** kelkajn jarojn pli frue de alia Islandano, Bjarni Herjulfson, en 986, sed li ne alteriĝis. Kaj laŭ alia versio (la Libro de Flatey), ne temas pri hazarda drivo, sed pri vola vojaĝo de Leif post la veno al Groenlando de Bjarni, de kiu Leif aĉetis la ŝipon sur kiu li foriris kun 35 dungitaj ŝipanoj. La unua paŝo de eŭropano en Ameriko tiam ne estus 1000 sed 1002.

***** Tial la unua eŭropa nomo de Ameriko estis nek "Zipango" nek la "Okcidentaj Indioj", sed Vinlando.

La [fuŝa] amerika rendevuo

Teologia vidpunkto de P-ro BERTEN o.p.* pri la katolika celebrado de la 500-jariĝo, dum la IV-a Konferenco de la latinamerikaj episkopoj (okazinta en San-Domingo de la 12-a ĝis la 28-a de oktobro 1992).

"Pentocelibrado en mia katedralo? Neniam!"
Tio estis la respondo de la ĉefepiskopo de San-Domingo, M-ro Rodriguez, al peto de brazila ĉefepiskopo komence de la unua semajno.

Enassemblee, 33 brazilaj episkopoj, el kiuj 12 ĉefepiskopoj, petis publikan pentocelibradon (...) La prezidantaro rifuzis, juĝanta tiun peton senutila ĉar, laŭ ĝi, vendredon 23-10-92, la enprogramita eŭkaristio estos penta eŭkaristio enhavanta modere malfermitan tekston en rilato kun la koloniado.

La 14-10-92 en Romo la Papo publike petis pardonon pro la perforto faritaj kontraŭ la indianaj popoloj kaj la afrikaj sklavoj. Tio estas la plaj forta pardonpeta teksto de Johano-Paŭlo la II-a dum tiuj lastaj jaroj kiam temis pri la 500-a datreveno.

[Sed] nek [M-ro] Sodano nek [M-ro] Rodriguez nek [M-ro] Trujillo partoprenis en la enprogramita pentocelibrado dum kiu, krome, neniu aludo estis farata pri la 500 jaroj. (...) La prezidantaro eĉ ne ŝanĝetis sian sintenon malgraŭ la paroloj de la Papo pri la pardono.

Rolo de certaj sektoroj de la roma Kurio

Johano-Paŭlo la II-a estas tre sentema por la krio de la malriĉo. Tio estas ĉe li io profunda. La Kurio, tia kia ĝi montriĝis, estas multe pli malvarma. Ĝi celas la doktrinon por ĝi mem. La demandoj pri justeco kaj malriĉeco estas tute marĝenigitaj kompare kun la zorgo pri la ordo en la Eklezio kaj la ordo en la socio. En la farmaniero de la Kurio, estas vera perforto kaj brutaleco. Ŝajnas al mi (...) ke la Kurio permesas al si certan nombron da liberecoj, kio estas vera uzurpado de povo.

En sia malferma parolado, la Papo parolis pri la aŭtentika majstreco de la episkopoj: forta esprimo kiu kongruas kun la tuta Tradicio. La episkopoj, kaj ĉefe la enassembleaj episkoparoj, havas rekonitan aŭtoritaton diri la kredon de la Eklezio.

La esprimo "*majstreco de la episkopoj*" aperis dufoje en la malneto de fina mesaĝo al Latin-Ameriko. En la publikigita teksto, cenzurita de la prezidantaro aŭ de la sekretariejo, la vorto "majstreco" malaperis. Alidirite, por la roma Kurio, plu estas nur unu majstreco, tiu de la [(ĉef)Pontifika Kongregacio por la] doktrino de la kredo. La episkopoj ne plu estas rajtigitaj diri la kredon de la Eklezio. Mi ne povas alimaniere interpreti la fakton ke, du fojojn, la vorto "*majstreco*" estis anstataŭigita de "*instruo*".

La Papo citis la finon de [la Evangelio de] Marko: "*Iru, evangelizu ĉiujn naciojn*". Kaj la Papo daŭrigis: *tio estas la unua fundamento de la evangelizado*. La fina Dokumento citas Johano-Paŭlo la II-a, la evangelion kaj la deklaron de la Papo "*tio estas la unua fundamenta de la evangelizado*". Sed, false-kaŝe, oni metis [la Evangelian teksteron de] Mateo anstataŭ [tiu de] Marko. Kaj Mateos diras: "*Iru, baptu ĉiujn naciojn*". Tiel oni translokiĝis la sencon de la teksto: de la Evangelio al la sakramento.

Favoraj punktoj

1/ Pli granda konscio de la latinamerika Eklezio kiel tia. Certas ke tiu malfeliĉa sperto plifortigis la deziron de la episkopoj ankoraŭ havi estonte la eblecon de ĝeneralaj konferencoj kie ili povu mem esprimi sin.

2/ (...) Ratifiko de la "*prioritata elekto de la malriĉuloj*" [fare de la Eklezio] (...)

3/ Aliaj zorgoj povis esprimiĝi, kiuj plilarĝigas la kampon:

- la virinoj povis esprimi sin. La unua teologio de la liberiĝo estis forte malina. La voĉo de la virinaro korpigis ene de la Eklezio, eĉ se ne povis esti debato pri la virina ordinita servado. Tio ne estis pensebla, pro la tipo de kontrolado de la asembleo.
- la kulturo (indiĝenaj, afrikanamerikaj kulturoj). Tio estas nova demando, prilaborita tiujn lastajn jarojn, ankaŭ traktita ĉe la asembleo laŭ interesa maniero (...)

[Sed] la maniero trakti la demandoj [pri etiko, kaj moderneco kaj sekularigo] estis ege negativa en San-Domingo ĉar tute doktrinema. Tio egalas puran kaj simplan kondamnon de la tuta laboro kiu estas farata ĉe ni [en Eŭropo] kaj en Nord-Ameriko pri la morala distingo kaj pri la eneklezia ekzistado en plurisma socio.

El la konkludoj

Mi opinias ke nuntempe estas vera povokapto, kiu estas maltrankviliga por la tuta Eklezio (...) Tio estas dolora, tragika. Mi opinias ke multaj episkopoj eliris de tio profunde vunditaj (...) Estas direnda la vero pri la institucia perforto. Mi estas konvinkita ke la Evangelio [t.e. "bona novaĝo"] estas vivoforto, kaj ke, necese, ĝi respruĉos.

* Laŭ raporto pri lia prelego en Bruselo la 1-an de decembro (en *Libre Pensée Chrétienne* (101 rue de Renaix, B-7890 Ellezelles), n°20, februaro 1993).

** Mk 16,15. Laŭ la kutima esperanta traduko [fare de protestantoj]: "*Iru en la tutan mondon, kaj prediku la evangelion al ĉiujn kreaĵojn*". (Ni ne povis konsulti la novan tradukon de Gerit Berveling).

*** Mt 28,19. Kutima esperanta traduko: "*Iru do kaj discipligu ĉiujn naciojn, bapante ilin en la nomo de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito*".

Indiĝenaj popoloj

2. La Naga-oj

Nord-oriente de Hindio trans Bangladeŝo, ĉe la birma landlimo, vivas la Naga-a naciaro, kies anoj (1) estis kromnomitaj de okcidentuloj (ĉefe britoj) la "kapĉasistoj".

Tute maltaŭge, laŭ Andrew GRAY :

"Eble estus pli bone se la esprimo estus definitive forlasita (...) ĉar ĝi konfuzas la motivon mortigi kun ties manieroj. La ekvivalento estus karakterizi la francojn kiel "kaptranĉistojn" ĉar ili gilotinas [nun : -is !] la mortkondamnitojn." (2)

Tiu kutimo venis de la kredo ke brava batalanto povas plialtigi la prosperon de sia vilaĝo aŭ klano, kaj ke tio originas el la "aren" aŭ spirito loĝanta en la kapo de persono, kiu propagiĝus sur la venkinton kaj lian komunumon. (3)

* La alia ekstremo en la troigoj estas la priskribo de la majoro J. Butler en 1875 :

" Ĉiu sekvas la regulojn de sia propra volo : formo de la plej pura demokratio [eĉ, pli ĝuste, anarkio !], kiu estas tre malfacile ja konceptebla kiel eĉ unutage ekzistebla ; kaj tamen, ke ĝi ekzistas ĉi tie, estas neneadebla fakto."

(Citita de V. ELWIN en The Nagas in the 19th century, O.U.P., 1969, p.525) .



Naga procesio

(Alia escepta formo de magia praktiko estis "best(antrop)iĝo" : la "vola ligiĝo de la animo al tigo aŭ leopardo" (4), fenomeno maloftege raportita, do malfacile analizebla.)

Sed por forigi tiun falseman, erarigan bildon pri teruraj kaj sangavidaj sovaĝuloj *, sufiĉas rimarkigi, ekzemple, ke :

" La Konyak[-Naga]-aj vilaĝoj Tamlu kaj Naŭsang, apartigitaj nur de unu valo, estis en situacio de milito unu kontraŭ la alia dum 16 jaroj. La nombro de ambaŭflankaj mortintoj atingis entute la ciferon kvar." (5)

Krom la postvenkaj festoj, kaj la "meritaj festoj" per kiuj oni povas disdoni sian troan riĉaĵon al la resto de la komunumo sub formo de riza biero kaj ofera viando (plie starigante monoliton), ambicio de ĉiu,

estis ankaŭ :

"tradiciaj agrikulturaj ritoj kaj vivociklaj ritoj, kiuj estis necesaj por la kresko de la grenoj kaj legomoj kaj por bona rikolto, same kiel por konduki la personojn tra la pasaj ritoj de la naskiĝo, geedziĝo, ĝis morto kaj posta vivo".(6)

En ĉiu vilaĝo estas klanaj "morung"-oj: fraŭl-hejmoj kie kune vivas kaj dormas ĉiuj adoleskantaj knaboj, ekde puberiĝo ĝis edziĝo. La morungo estas mikrokosmo de la vilaĝo. La geedziĝo ofte estas laŭ elekto de la gejunuloj mem, kiuj enamiĝas unu al la alia. Fojfoje okazas eksedziĝoj antaŭ ol naskiĝis infanoj (ĉefe ĉe la Ao-oj kaj Angami-oj).

Ĉiuj ritoj ĉe la Naga-oj konsistas el du principoj: "genna"-o kaj ofero. Ofero konsistas el transpaso de la limoj apartigantaj la komunumon kaj la spiritan mondon. Post ofero, viando kaj/aŭ rizo estas disdonita(j). Poste, sekvas *genna*-a periodo dum kiu la limoj estas restarigataj kaj la "aren"-o aŭ beno devenanta de la rito, povas nature disvolviĝi.

" La amasa adopto de kristanismo provizis komplementon aŭ substituadon al tiuj ritoj ; tio signifis la transformiĝon sed ne la detruigon de la tradicia Naga-a religio (...) " (7)

Historio

" La unuaj misiistoj [usonaj baptistoj] venis en nian landon en la 1860-aj jaroj (...) Ili diris kaj instruis al la Naga-aj kristanoj ke ĉio tradicie Naga-a estas malbona. Ke tio estas pagana, kaj ke ili ne devus kanti Naga-ajn kantojn, vestiĝi per Naga-aj vestaĵoj aŭ partopreni en Naga-aj festoj. Tio detruis multon el la riĉeco de la Naga-a kulturo (...) Ili malpermesis trinki rizan bieron, sed tio estas esenca nutraĵo por la Naga-oj." (8)

" La misiistoj estis la kulpantoj forigante la Nagan kulturon kia ĝi esprimiĝas en iliaj kantoj kaj energiaj kaj kolorplenaj dansoj (...) Malpermesi dansi kaj trinki eĉ la plej malfortan rizan bieron igis la vilaĝojn dividiĝi ; unu parto estanta nekristana kaj la alia kristana." (9)

" La agadoj de la baptista misio ĉe la Naga-oj demoralizis la popolon, detruis triban solidarecon kaj malpermesis ĝojojn kaj festojn, dekoraciojn kaj ĉarmon de la komunuma vivo." (10)

" Poste venis al Nagalando katolikaj misiistoj. Pri la Naga-a kulturo ili estis pli impresiĝemaj ol la baptistoj, permesantaj tradiciajn kantojn kaj trinkadon de riza biero. Eĉ se la katolikoj estas minoritato en Nagalando, tio estis favora punkto pri ili." (11)

Kaj la ŝanĝo de religio verŝajne restis supraĵa ĉe la plejparto :

" En la Naga-a religio abundas tabuoj kaj ankaŭ kristanismo starigas striktajn regulojn pri kio devas esti farata kaj kio devas esti nefarata. Por multaj akcidencaj konvertitoj la ŝanĝo de kredo signifis nenion pli ol interŝanĝo de tabuaro por alia.

" Ekzemple, devige ripozaj tagoj ĉiam estis observataj de la Naga-oj. Labori en tiuj tagoj signifus ofendi diversajn diojn kaj spiritojn. Nun kiam ili fariĝis kristanoj, ili observis la dimanĉan nelaborecon, kies malrespektado estus ofendo al la nova dio." (12)

Haraka kulto

" En 1916/17, 4.000 Naga-oj estis rekrutitaj kaj senditaj trans la maron al la infero en Francio. Tiel ili fariĝis konsciaj pri la pli vasta mondo malantaŭ siaj montoj, kaj ankaŭ pri la sovaĝeco kun kiu la tielnomataj civilizitaj nacioj militis (...) Oni povas diri ke sur la francaj batalkampoj kaj en la tranĉeoj estis forĝata la lancoklingo de la nova Naga-a naciismo." (13)

Aperis en 1929-1933 religi-politika movado, nomata la Haraka Kulto, "miksaĵo el Hinduismo kaj Animismo" (14), kiu fulme disvastiĝis. Ĝi precize originis el la influoj alportitaj en la montojn, de la veteranoj de la unua mondmilito.

Ĝadunang, Rongmai-a Naga-o de la vilaĝo Puilon en Manipuro, servis kiel simpla soldato en Mezopotamio. Post sia reveno en 1925, li komencis prediki pri "Dia regno" en kiu ĉiu estus egale traktata rilate homrajtojn, liberecon kaj devojn.

Liaj disĉiploj iris ĉien en la lando, predikante lian mesaĝon pri egaleco. Ili predikis liberiĝon el la brita jugo, kaj kiam la movado pasis en Birmon, homoj gvidataj de iu Saja San stariĝis kontraŭ la koloniantoj. Sur la hinda teritorio enloĝantoj de la ebenaĵoj en la Naga-aj regionoj estis mortigitaj kaj la britaj aŭtoritatoj sendis trupojn kontraŭ la sekto.

Ĝadunang estis arestita kaj ekzekutita en Imphal la 29-an de aŭgusto 1931. La movado daŭris sub la gvidado de lia disĉiplino Rani [=Reĝino?] Gaidiliu. Ŝi estis arestita komence de 1933, kondamnita pro starigo de "malama kulto" kaj gvidado de ribelado, kaj malliberigita en Asamo.


Postbrita politika situacio

Gandhi mem, la 19-an de julio 1947, nur kelkajn semajnojn do antaŭ la sendependiĝo de Hindio, klare promesis :

" La Nagaoj havas ĉiujn rajtojn esti sendependaj. Ni ne volis vivi sub la regado de la Britoj kaj ili nun forlasas nin. Mi volus sentigi al vi ke Hindio estas via (...) Mi kredas je la frateco de la homoj sed mi ne kredas je forto aŭ perforta unuiĝo. Se vi ne deziras aliĝi al la Hinda Unio, neniu altrudos vin fari tion."

Sed post interkonsentita dekjara transira periodo de provizora registareco asistata de Hindio, malgraŭ ilia klara plebiscito en 1951 kaj adopto de Federacia Konstitucio de popola suverena respubliko Nagaland fare de Naga-a Registaro proklamita en 1956, Hindio rifuzis agnoski la sendependecon de Nagalando.

Sekvis milito kaj kreo de nova ŝtato trudite en la kadro de la Hinda Unio (dec.1963) ; sed Porpaca Misio (1964-66, formita de la Nagalanda Baptista Eklezio), malgraŭ batalĉeso, ne sukcesis atingi akordon. Kaj, ekzemple, la Hinda Centra Registaro denove trudis militleĝon en Nagalando dum du jaroj en la 70-aj ; kaj la militista subpremo daŭris en la 80-aj jaroj. (Iuj asertis ke ekde 1956 100.000 Naga-oj mortis en bataloj).



Cetere la ekzemplo de la Naga-oj instigis aliajn proksimajn gentojn, la Bodo-ojn, postuli suverenan Bodolandon (en Asamo) konsistantan el 4.435 vilaĝoj. Post trijara batalĉeso, lastan aŭtumnon, Bodo-aj ribelantoj bombe mortigis 55 homojn kaj detruis aŭtoŝosean ponton, rompante la nuran aŭtan ligilon inter Asamo kaj la resto de Hindio. (15)

Nuna religia stato

90 % el la Naga-oj estas kristanoj : *" Parto el ili rompita kun la pasinto, sed parto daŭre konsideras sian tradician religion kaj kristanisman tute akordigeblaj (...) La spirita mondo de animismo facile povas kongrui kun, ekzemple, la Sankta Spirito. Tiu indiĝena kristanismo daŭre rekonas la animon kiel peranton por esti en kontakto kun la prauloj."* (16)

" Nuntempe fariĝis laŭmode por eksterlandaj intelektuloj aŭ eĉ Naga-aj scienculoj ataki la misiistojn (...) Oni devus diri ke parto el ili estis sinceraj, kaj ke tio parte venis de ilia nescio kiam ili diris ke oni devas fariĝi kiel usonanoj aŭ eŭropanoj por esti kristano. Ni devas lerni el iliaj eraroj. Sed estas tute freneze diri, kiel kelkaj faras, ke pro kelkaj misiistoj la tuta kristanismo estas malbona kaj ke 90 % el la Naga-oj refariĝos animistoj. Ni devas akcepti la fakton ke la Naga-oj estas kristanoj."

" Mi tre profunde pensis pri la rilato inter tradicia Naga-a socio kaj kristanismo. Eĉ se mi [ĝuste nun] parolas en la angla, fojfoje surmetas eŭropajn vestaĵojn kaj ofte manĝas ne-Naga-an manĝaĵon, mi daŭre estas en mia koro Naga-o. Mi estas fiera pro tio, kaj tio estas la spirita paco de mia kulturo kaj identeco. La aliaj aĵoj kiujn mi parolas, manĝas aŭ surmetas estas kromproduktoj. Mia filozofio, mia Naga-a identeco kaj mia kulturo venas de interne."

" Mi devas konfesi ke eĉ hodiaŭ, estas kristanoj en Nagalando kiuj estas iomete hontemaj pri la Naga-a kulturo. Ili diras ke ni ne devas kanti Naga-ajn kantojn ĉar ili ne estas kristanaj. Multaj kantas usonanajn [religiajn] kantojn ĉar ili opinias ke tio estas kristana. Sed ili pravigas la Okcidentanojn kaj Hinduojn kiuj diras : "Vidu, vi fariĝis kristanoj kaj perdis vian Naga-econ." Tio ne estas vera."

" Eŭropanoj ne havas la monopolon pri kristanismo (...) Kristanismo venis al Eŭropo de Azio, kaj estis kristanaj Hindoj 500 jarojn antaŭ kristanaj eŭropanoj (17). Kiam eŭropanoj fariĝis kristanoj ili faris ĝin eŭropa indiĝena religio. Ili ŝanĝis siajn nomojn kaj starigis festojn en rilato kun siaj kulturoj."

" Nun mi, kiel multaj Naga-oj, estas kristano, sed mi ne estas eŭropano. Mi havas rilaton kun mia Dio. Nun mia Dio povas paroli al mi pere de miaj songoj, ĝuste kiel okazis al miaj Angami-aj prauloj. Ne necesas ke mi estu kiel la anglikanoj aŭ la katolikoj kaj plenumu ĉiujn tiujn ritojn. Mi ne bezonas ilin. Kion mi priparolas estas Naga-a kristanismo - indiĝena Naga-a kristanismo.

Al teologia sintezo?

" En la Angami-a lingvo, Dio estas uŝevinphü. Ŝi estas ina : la kreantino kiu estas "la virino kiu donas la vivon" (...) La animo en la Angami-a estas ropfu, kiu estas interne de la korpo. Terhomia estas ekster la korpo kaj fariĝas spirito. La Sankta Spirito estas bona terhomia. Tra la terhomia mi sentas en songo kontakton kun Dio.

" Kristanismo ne estas stranga por la Naga-oj ĉar ĝi havas rilatojn kun nia estinta tradicia religio. Kristanismo povas esti komprenata laŭ multaj manieroj, kaj ĝia teologio eniris tre profunden en la Naga-a kulturo. Pluraj Naga-oj studas teologion (...) Multaj teologiaj seminarioj fariĝis pli flekseblaj laŭ mezure kiel pasis la jaroj, kaj akceptos la Naga-ajn interpretojn. En kolegioj, Naga-aj teologistudentoj plenumas Naga-ajn dansojn kaj kantojn, do ŝajnas ke ili fariĝis pli flekseblaj (...) "

Notoj :

(1) Vivantaj sur vasta teritorio (30.000km²), la Naga-oj estas pli ol unu miliono. Ili estas unu el la mongolasaj grupoj kiuj parolas lingvojn el la tibet-birma lingva familio. Duono el ili formas la loĝantaron de Nagalando, malgranda ŝtato de la Hinda Unio (ĉefurbo: Kohima), inter Asamo kaj Manipuro (kie ili estas ankaŭ tre multaj) ; ankaŭ en Birmo estas parto de la teritorioj de pluraj gentoj (Phom, Chang, ktp.) - aŭ nacioj, kiel ili preferas difini sin.

(2) Andrew GRAY, "The British in Nagaland : their anthropology and their legacy", p.55, en The Naga nation and its struggle against genocide : a report compiled by IWGIA, Kopenhago: Internat. Work Group for Indigenous Affairs (Internacia Labor-Grupo por Indiĝenaj Aferoj, Internacia Sekretariejo : Fiolstræde 10, DK-1171 Copenhagen K), p.37-65 (231 p.) : de tiu libro ni ĉerpas la preskaŭ tuton de nia artikolo.

(3) Laŭ klarigo de J.P. MILLS, The Ao Nagas [aŭ The Rengma Nagas ?], Londono : MacMillan, p.161 .

(4) A. GRAY, samloke.

(5) J.P. MILLS, samloke p.209.

(6) A.GRAY, samloke p.56 .

(7) Samloke.

(8) Anonima Naga-a intervjuito, en la IWGIA-raporto p.105 .

(9) M. HORAM, "Social change in Nagaland", en Man in India, vol.55, n-ro 2, p.10-11 .

(10) V. ELWIN, citita en A. YONUO, The rising Nagas, Delhi : Vivek. publishing house, 1974 .

(11) Anonima Naga-o, IWGIA-raporto p.105-106

(12) M. HORAM, samloke.

(13) Colin JOHNSON, "A captured nation : The Naga dilemma", p.17 en IWGIA-raporto (p.6-36)

(14) Samloke, p.18 .

(15) Laŭ India today, 15-an de dec. 1992, p.16 .

(16) A.Gray, samloke p.55 .

(17) Troigeto, kvankam fakte, firma tradicio asertas ke Hindio estis evangelizita de la apostolo Tomaso alveninta en 52 p.K.

Christian Lavarenne



Naga-aj infanoj

La juna monaĥo Jampel Changchub estis kondamnita al 19-jara mallibereco pro diskonigo de "reakciaj tekstoj": fakte temis pri tradukado de la deklaro pri la homaj rajtoj. (Le Monde, 7-2-93)

En Lhasao okazis pacaj manifestacioj en februaro kaj majo 1992. La ĉinaj aŭtoritatoj rekonis en majo, ke trideko da arestoj okazis en la ĉefurbo sekve de sep aŭ ok manifestacioj. Dek tibetanoj, kiuj estas inter 18 kaj 25-jaraj, estis inter la tujaj arestoj; kaj post pluraj monatoj en malliberejo, ili estis kondamnitaj en aŭgusto kaj septembro, al mallibereco dum 5 ĝis 9 jaroj pro nura kriadado de sloganoj por la sendependeco de Tibeto, tiel kulpaj pro "kontraŭrevolucia propagando" laŭ la ĉina Kriminala Kodo.

Lobsang Dorĝe, 20-jara monaĥo, rigardita kiel la ĉefo de la manifestacio je la 16-a de majo, estis kondamnita al 9-jara mallibereco. Lobsang Drolma, 22-jara religiulo, estis kondamnita al 7-jara mallibereco pro organizado de la manifestacio je la 5-a de februaro 1992.

La juĝistaj decidoj, reproduktitaj de "Tibetan Information Network", mencias nenian alian akuzon kontraŭ ili; la manifestacioj pro kiuj ili estis krimkulpigitaj estis pacaj, neamasaj, kaj daŭris nur kelkajn minutojn laŭ atestantoj kiuj precizigas ke pluraj kondamnitoj estis batitaj dum sia restado ĉe la policejo, kaj ne estis asistataj de advokatoj dum la proceso.

El Lettre du Tibet n-ro 11, januaro 1993.

Alvoko

de la 100-homa Komitato por Tibeto
(el kiuj 16 Nobel-premiitoj)

" (...) Dum la lastaj 40 jaroj, pli ol unu miliono da Tibetanoj estis surstrate mortigitaj, murditaj en malliberejoj, aŭ mortis pro malsato. Pli ol 6.000 monaĥejoj kaj temploj estis detruitaj. Kaj hodiaŭ la amasa ekloĝigado de ĉinoj en Tibeto minacas la ekziston mem de la aparta identeco nacia, kultura kaj religia de la tibeta popolo. Nin koncernas la daŭraj atencoj kontraŭ la homrajtoj en Tibeto (...)

La pluvivado de la tibeta popolo estas endanĝerigita. Ni kredas ke estas tempo subteni Tibeton."

Subskribis, inter aliaj, Elie Wiesel, M-ro Desmond M. Tutu, Rev. Theodore Hesburgh, Rabbi Joseph Glaser (Usono), Supaporn Pongpruk (Tajlando, "Internacia reto de agantaj budhistoj"), Arun Gandhi (Dir. de la Instituto M.K.Gandhi por Malperforto), Coretta Scott King (fond. kaj prez. de la Centro Martin Luther King), Joan Baez, Peter Barry (eksa ministro de la ekst. af. de Irlando), Petra Kelly kaj generalo Gert Bastian (vidu bedaŭrinde ilian nekrologon en "Verdire" n-ro 9, jan. 1993)...

En Francio jam kelkaj magistratoj (t.e. "komunumaj konsilantaroj") oficiale decidis "ĝemeliĝi" kun unu tibeta malliberigito pro opiniesprimo: ili devontigas sin regule skribi al la ĉinaj aŭtoritatoj por peti lian liberigon: "*Kiam la urbestro sendos leterojn (...), nome de sia urbo li tion faros. Tio estas iomete kvazaŭ la 18.000 urbanoj skribus por subteni subprematon (...)*"

Strasburgo estis la unua, en 1990, kiu prenis la iniciaton "ĝemeliĝi" kun du tibetaj malliberigitinoj kiuj, post tiam, retrovis sian liberecon.

Tibetaj infanoj : Esperanta domo ?

En Dharamsala (la restadejo de la ekzilita Dalai-Lamao en norda Bharato), la "**Tibet-infana Vilaĝo**" (konstruita por 1.400 junegaj rifuĝintoj) jam estas pli ol plena. Novaj domoj estas konstruendaj. Ĉiu el ili, kiu ebligas loĝigi inter 25 kaj 35 infanojn, kostas iomete pli ol 20.000 gld. Ni estas invitataj partopreni en la konstruado per simbolaj "ŝtonoj" (= 20 gld por ĉiu el la 1.000 kiuj "konsistigas" unu domon).

"*La nomo de ĉiu doninto (entrepreno, asocio aŭ individuo) estos menciita en libro pri la konstruado de tiu vilaĝo de la solidareco, kaj skribita sur la domo mem*". Kaj - kial ne iomete revii? - se la esperantistoj kaj esperantaj asocioj sukcesus kolekti la tutan sumon por unu domo, tiu ĉi povus ricevi la nomon de sia "baptopatro" (t.e. la financinto), ekzemple "**Domo de Esperanto**", aŭ ion similan.

Jen partoj el la letero de S-ino Jetsun Pema, Ministro pri Edukado de la ekzila Tibeta Registaro post ŝia akcepto en Parizo:

"*Kara S-ro Privat (...)* Mi trovis la interparoladon (...) tre interesa kaj utila (...) Kiel mi persone klarigis, ĉiujare ni ricevas kelkajn centojn da infanoj kiuj alvenas el Tibeto; kaj estas plej malfacile por ni alfronti la kreskegantajn problemojn en niaj vilaĝoj.

"*Ni kredas ke la konstruado de nova vilaĝo estas la ununura rimedo por solvi la nunan problemon de plenŝtopiteco, same kiel por ebligi nin akcepti aliajn indajn infanojn ĉiufoje kiam ŝajnas al ni necese.*

"*(...) Kiel mi estis dirinta, ni povus ja doni la nomon de ĉiu regiono [de Francio, pri kiuj temis ĉi-kaze] al la financitaj domoj.*

"*Ni trovis terenon sufiĉe proksiman de Dharamsala kiu taŭgas por la nova vilaĝo. La vilaĝo estos tre grava parto en la helpo al la edukado de tiuj tibetaj infanoj (...)* Ni estos pli ol ĝojaj liveri ĉiujn detalojn kiujn vi povas bezoni por tiu projekto.

"*Antaŭdankante vin pro via asistado, sincere via.*"

Leteroj

La 10-an de januaro 1993

Kara Sinjoro,

Rilate vian leteron je 18-12-92, kune kun ekzemplero de la revuo (...), ni ege dankas vin pro via speco de **agado**, tute konforma al la **deziresprimoj de la Dalai-Lamao**: diskonigi la situacion en Tibeto.

(...) Atendante eventuale renkonti vin por daŭrigi tiun kunlaboradon, ni dankas vin pro via koncernateco pri la tibeta afero; kaj, kiel diras la tibetanoj, "*taŝi deleg*" [=ĉion bonan] kaj bonan jaron 1993!

J.M. Brodu

[Ĝenerala Sekret. de la "Komitato de Subteno al la Tibeta Popolo" (CSPT)]

Trelon, la 26-an de januaro 1993

Kara amiko,

(...) Mi estis tre ĝoja ricevi Asistilon (...) Ni estas **islam-kristana paro** kaj ni publikigis dum 17 jaroj etan franclingvan bultenon "*Dialogue*" [Dialogo], en kiu ni parolis pri Islamo, kristanismo, judismo ktp., kaj pri la problemoj de **dialogo inter religioj**.

(...) Mi provos kun mia edzo sendi al vi tekston pri la ekzisto en Francio de la renkontiĝo de islam-kristanaj paro (ne esperantistoj) dum la Pentekosta semajnfino en la Pariza regiono. Sed eble la renkontiĝo estante senrilata kun Esperanto, ne interesas Asistilon?

Samideane al vi, esperante, se vi bonvolas, bonan dialogon inter ni, kaj kun Asistilo.

Ghislaine Bayod

Albanio

Unu el la akiroj de demokratio en Albanio estas la alvoko al la preĝo. Cent moskeoj remalfermiĝis, kun la financa subteno de asocioj el Saudi-Arabio, Egiptio aŭ Pakistano. Ankaŭ la kristanaj preĝejoj remalfermiĝis en la sudo. La ikonoj estas remetitaj en siaj niĉoj, la pastro eliris malliberejon, la tutnigre vestitaj maljunulinoj forigas el la kapeloj iliajn kinejajn seĝojn. Religio estis malpermesita en 1967. Nuntempe la registaro taksas ke 70% el la 3,2 milionoj da Albanoj estas islamoj, 12% katolikoj kaj 18% ortodoksoj.

- "*Ĉu la religia faktoro povas konsistigi minacon?*", demandis Corine Lesnes* al verkisto **Ismail Kadare**.

- "*La tri religioj bone kunvivadis dum jarcentoj. Unuafoje, politikaj fortoj, pro fipartiaj kialoj, provas eksciti maltoleron inter la religioj. Tio estas vera krimo. Se ankoraŭ aldoniĝos tiu malfeliĉo, tio estos troa por Albanio.*"

* Speciala sendito de *Le Monde*

Indiĝenaj popoloj



Totemo de kanadaj indianoj

La totemismo estas la kulto ne al iuj bestoj aŭ homoj aŭ bildoj, sed al ia anoni-ma kaj ne-persona forto kiu troviĝas en ĉiu el tiuj estaĵoj, tamen sen esti identa kun iu el ili. Neniu posedas ĝin tutan kaj ĉiuj partoprenas en ĝi.

Ĝi estas tiel sendependa de la apartaj subjektoj en kiu ĝi enkarniĝas, ke ĝi antaŭas al ili same kiel ĝi pluviĝas post ili. La individuoj mortas; la generacioj pasas kaj estas antaŭigataj de aliaj; sed tiu forto restas ĉiam aktuala, vivanta kaj simila al si mem. Ĝi animas la hodiaŭajn generaciojn kiel ĝi animis la antaŭajn, kiel ĝi animos la postajn.

Prenante la vorton en tre larĝa senco, oni povus diri ke ĝi estas la dio kiun adoras ĉiu totema kulto. Sed tio estas nepersona dio, sen nomo, sen historio, imanenta en la mondo, difuza en nenumerebla multego da aĵoj (...) [p.270] Oni vidas kiom ĝi diferencas de la estaĵoj en kiuj ĝi restadas tial ke ĝi estas la animo de tiom da diversaj estaĵoj.

Aŭstralio

Sed tiun nepersonan forton la Aŭstraliano ne prezentas al si sub ties abstrakta formo (...) Li estas kondukita al konceptado de ĝi sub la specoj de besto aŭ de vegetaĵo, unuvorte de sensebla aĵo.

Jen en kio reale konsistas la totemo: ĝi estas nur la materia formo sub kiu estas prezentita al la imagoj tiu nemateria substanco, tiu tra ĉiuj specoj de heterogenaj estaĵoj difuza energio kiu, sola, estas la vera objekto de la kulto (...)

La universo, tia kia la totemismo konceptas ĝin, estas trairata, animata de certa nombro da fortoj kiujn la imago prezentas al si sub figuroj ĉerpitaj, preskaŭ senescepte, aŭ de la animala aŭ de la vegetala regno: estas tiom da tiuj fortoj kiom da klanoj en la tribo, kaj ĉiu el ili cirkulas tra certaj kategorioj de aĵoj, kies esenco kaj vivprincipo ĝi estas.

[p.271] Kune kun fizika aspekto, tiuj fortoj samtempe havas moralan karakteron (...) La indiĝeno havas rilate al la sanktaj estaĵoj ne nur timon sed ankaŭ respekton. La totemo estas la fonto de la morala vivo de la klano. Ĉiuj estaĵoj kiuj komunias*

3. Totemismo

en la sama totema principo rigardas sin, per tio mem, kiel morale ligitajn unu kun la aliaj ; ili havas unu kontraŭ la aliaj difinitajn devojn de asistado ktp. (...)

[p.273] Estas aliaj [parencaj socioj] kie ĝi [la nocio de nepersona religia forto] estas asertita en sia abstrakta pureco kaj eĉ atingas multe pli altan gradon da ĝeneraleco ol en Aŭstralio.

Se la diversaj totemaj principoj al kiuj sin turnas la diversaj klanoj el sama tribo estas apartaj unu de la aliaj, tamen ili estas, funde, similaj inter si ; ĉar ili ludas la saman rolon en sia respektiva sfero. Nu, estas socioj kiuj havas la senton de tiu komuneco de naturo, kaj kiuj, sekve, leviĝis al la nocio de unika religia forto, kies nuraj modaloj ĉiuj aliaj sanktaj principoj estus, kaj kiu farus la unuecon de la universo (...)

Siuoj

[p.274] Tion oni povas observi ĉe granda nombro da amerikaj triboj, interalie ĉe tiuj kiuj apartenas al la granda familio de la Siuoj : Omaha, Ponka, Kansas, Osage, Assiniboin, Dakota, Iowa, Winnebago, Mandan, Hidtsa ktp. (...)

Ĉe tiuj popoloj, super ĉiuj apartaj dioj kiujn la homoj kultas, ekzistas eminenta potenco kies kvazaŭ derivitaj formoj ĉiuj aliaj estas, kaj kiun ili nomas *ŭakan*. Pro la supera situacio kiu estas tiel atribuita al tiu principo en la Siua diaro, oni iafoje vidis en ĝi ian suverenan dion, ian Jupiteron aŭ JaHVeHon, kaj la vojaĝantoj ofte tradukis *ŭakan* per *Granda spirito*.

[p.275] Tio estis grave miskompreni ties veran naturon. La *ŭakan*-o ne estas, en neniu grado, persona estaĵo : la indiĝenoj ne prezentas ĝin al si sub determinitaj formoj. "*Ili diras, raportas observinto, ke ili neniam vidis la ŭakan(da)-on ; tiel ne eblas ke ili pretendus personigi ĝin*"**. Eĉ ne eblas difini ĝin per determinitaj atributoj kaj karakteroj.

"*Neniu termino povas esprimi la signifon de la vorto ĉe la Dakota-oj. Ĝi entenas ĉiun misteron, ĉiun sekretan povon, ĉiun diecon*".*** Ĉiuj estaĵoj kiujn la Dakota-o respektegas, "*la tero, la kvar ventoj, la suno, la luno, la steloj, estas manifestiĝoj de tiu mistera vivo kaj de tiu povo*" kiu cirkulas tra ĉio.

Jen ĝi estas prezentita sub la formo de la vento, kiel blovo kiu havas sian restadlokon ĉe la kvar ĉefpunktoj kaj kiu movas ĉion ; jen ĝi estas la voĉo kiu aŭdiĝas kiam sonegas la tondro ; la suno, la luno, la steloj estas *ŭakan*-o (...). Tio ne estas difinita kaj difinebla povo, la povo fari tion aŭ tion ; tio estas *la Povo*, absolute, sen ia epiteto nek determiniĝo. La diversaj diaj potencoj estas nur ties apartaj manifestiĝoj kaj personiĝoj ; ĉiu el ili estas tiu povo vidita sub unu el ties multoblaj aspektoj (...)

[p.276] Kaj la dioj ne estas la nuraj estaĵoj kiujn ĝi animas : ĝi estas la principo de ĉio kio vivas, de ĉio kio agas, de ĉio kio moviĝas.

"*Ĉiu vivo estas ŭakan-o. Kaj estas tiel pri ĉio kio manifestas ian povon, ĉu sub la formo de pozitiva ago, kiel la ventoj kaj la nuboj kiuj amasiĝas, aŭ de pasiva rezisto, kiel la roko rande de la vojo*".****

[p.284] (...) Tio estas la unua materio per kiu estis konstruitaj la estaĵoj ĉiaspecaj kiujn la religioj el ĉiuj tempoj konsakris kaj adoris. La spiritoj, la demonoj, la genioj, la dioj de ĉiu grado, estas nur la konkretaj formoj kiujn prenis sur sin tiu energio - tiu *potencialo* kiel nomas ĝin Hewitt - individuigante, fiksiĝante sur iu determinita objekto aŭ sur iu spacopunkto, koncentrigante ĉirkaŭ estaĵo, ideala aŭ legenda sed konceptita kiel reala de la popola imago.

Dakota-o, pridemandita de fraŭlino Fletcher, esprimis en pitoreska stilo tiun esencan samsubstancecon de ĉiuj sanktaj aĵoj :

" Ĉio kio moviĝas, haltas tie aŭ tie, tiam aŭ tiam. La birdo kiu flugas, haltas ĉe iu loko por fari sian neston, ĉe alia por ripozi de sia flugado. La homo kiu piediras, haltas kiam plaĉas al li.

" Estas same por la dieco. La suno, tiel brila kaj grandioza, estas loko kie ĝi haltis. La arboj, la bestoj, estas aliaj tiaj lokoj. La Indiano pensas pri tiuj lokoj kaj sendas al ili siajn preĝojn por ke ili atingu la lokon kie la dio haltis, kaj por ricevi helpon kaj benon."

Emile DURKHEIM*****

Notoj

* PIV, pro uzo de K. Bein*, erare donas por "komunii" la difinon taŭgan por "komunigi". Komunii signifas esti en komunio, t.e. ne ĉefe, malvastsence, "partopreno en la Eŭkaristio" (PIV) laŭ tro limigita (nur katolika) signifo, sed pli larĝe, intima partopreno en io komuna, kio ajn tio estas.

* Li logike konstruis sian uzon ("*la pastro komunias la absolvitan pekulon [pekinton cetere estus preferinda!]*") sur la tute taŭga Zamenhofa uzo ("*ili ĉiuj estis en la preĝejo por komunigi*"). Sed tiu logiko lia (laŭ la tipo komenciĝi / komenci), ĉi tie estis erara kaj oni devas preferi la alian ankaŭ tute logikan sistemon laŭ la tipo blankiĝi / blankigi / blanki (= esti (radie) blanka).

** Cit. de Dorsey, "A study of Siouan Cults" en la XI-a Annual Report of the Bureau of American Ethnology, p.372.

*** Riggs, *Tah-Koo Wah-Kon*, p.56-57 .

**** XI-a Annual Report of the Bureau..., p.433 .

***** Kiel sekvo de Asistilo n-ro 11, p.5 ; eltiraĵoj el *Les formes élémentaires de la vie religieuse*, 1925.

Pri la Kataroj (1) oni multe skribis, eĉ ofte pli malpli senbaze. Anstataŭ aldoni unu plian vidpunkton, por kio ni estas nekompetentaj, ni preferas lasi ilin mem paroli, prezentante tradukon de unu el iliaj malmultaj nedetrinitaj tekstoj (ĉu pli ol 6 entute?): manuskripto de la 13-a jc en la okcitana, konservita en la Komunuma Biblioteko de Liono kaj eldonita en Parizo en 1887... (Tiu unua katarisma ceremonio cetere ŝajnas al ni tute taŭga komence de la tradicie penta Karesmo por la kristanoj.)

Ni venis antaŭ Dion kaj antaŭ vin (2) kaj antaŭ la ordenon (3) de la Sankta Eklezio, por ricevi [farendan] servon kaj pardonon kaj pentofaron pro ĉiuj niaj pekoj, kiujn ni age aŭ dire aŭ pense aŭ iel ajn faris ekde nia naskiĝo ĝis nun, kaj petas pri mizerikordo Dion kaj vin, por ke vi preĝu por ni la sanktan Patron ke li pardonu nin.

Ni adoru Dion kaj ni rivelu ĉiujn niajn pekojn kaj niajn multajn gravajn ofendojn al la Patro kaj la Filo kaj la honorata Spirito, kaj al la honorataj sanktaj Evangelioj kaj la honorataj sanktaj Apostoloj, dank'al la preĝado kaj la fido, kaj dank'al la savo de ĉiuj lojalaj gloraj kristanoj kaj de la feliĉaj antaŭuloj kiuj dormas [en siaj tomboj], kaj de la fratoj kiuj ĉirkaŭas nin, kaj antaŭ vi, sankta Sinjoro (4), por ke vi pardonu al ni ĉion en kio ni pekis. **Benedicite parcite nobis** (5).

Ĉar multaj estas niaj pekoj en kiuj ni ofendas Dion ĉiun tagon, nokte kaj tage, parole kaj age kaj pense, vole kaj nevole, kaj pli per nia volo kiun la malbonaj spiritoj alportas sur nin en la karno per kiu ni estas vestitaj. **Benedicite parcite nobis** (6).

Tute same kiel la sankta parolo de Dio instruas al ni, la Sanktaj Apostoloj kaj niaj spiritaj fratoj anoncas al ni ke ni forĵetu ĉiun deziron de la karno kaj ĉiun malnoblaĵon, kaj faru la volon de Dio, la plenumiĝinta Perfekta Bono; sed ni, pigraj servistoj, ne nur ni ne faras la volon de Dio kiel konvenus, sed ni plenumas la dezirojn de la karno kaj la zorgojn de la mondo, tiel ke ni nocas niajn spiritojn. **Benedicite parcite nobis**.

Ni kuniras kun la homoj de la mondo, kaj kun ili ni restadas kaj parolas kaj manĝas, kaj pekas en multaj aferoj, tiel ke ni nocas niajn fratojn kaj niajn spiritojn. **Benedicite parcite nobis**.

Per niaj langoj ni falas en senutilajn parolojn, en vanajn paroladojn, en ridojn, en mokojn kaj malicojn, en kritikadon de fratoj kaj fratinoj, kiujn ni ne estas indaj juĝi kaj kies ofendojn kondamni: inter la kristanoj (7), ni estas pekuloj. **Benedicite parcite nobis**.

La servicon kiun ni ricevas ni ne plenumas kiel konvenus, nek la faston, nek la preĝadon: ni malobservas niajn tagojn, ni prevarikas (8) niajn horojn, dum ni estas en la sankta preĝado nia sento deturnas sin al la karnaj deziroj, al la primondaj zorgoj, tiel ke en tiu horo apenaŭ ni scias kion ni prezentas al la patro de la justuloj. **Benedicite parcite nobis**.

Ho ci, sankta kaj bona Sinjoro, ĉiujn tiujn al ni okazintojn ĉe nia sento kaj ĉe nia penso ni konfesas al ci, sankta Sinjoro, kaj la tutan multegon da niaj pekoj ni demetas en la mizerikordon de Dio kaj en la sanktan preĝadon kaj en la sanktan evangelion; ĉar multaj estas niaj pekoj. **Benedicite parcite nobis**.

Ho ŝinjoro, juĝu kaj kondamnu la malvirton de la karno, ne kompatu la karnon naskiĝintan el koruptiĝo, sed kompatu la spiriton metitan en malliberejon, kaj devigu nin al tagoj kaj horoj da petadoj pri graco, kaj da fastoj, kaj al preĝadoj kaj predikoj, kiel tio estas la kutimo ĉe la bonaj kristanoj, por ke ni ne estu juĝotaj kaj kondamnataj en la tago de la juĝo kiel la perfiduloj. **Benedicite parcite nobis**.

Notoj.

(Ni uzis la francan tradukon de René NELLI (*Écritures Cathares*, Paris, 1968), reproduktitan en *Cahier "Évangile et Liberté" n°89, sept. 90, p. V*).

1/ Pri kiuj mallonge skribis Daniel Pfeiffer en sia letero, vidu n-ro 11 p. 20.

2/ Verŝajne la Maljunulo, estro de la katar(ist)a komunumo.

3/ Verŝajne konsistanta el la "Kristanoj" aŭ "Bonaj Homoj", kiel ili estas nomataj pli malsupre.

4/ Verŝajne la Maljunulo.

5/ "Benu, kompatu nin". Kvankam ne indikite, verŝajne kun tiu latina formulo estis farita(j) unu (aŭ tri?) "riverenco(j)".

6/ Vidu la antaŭan noton. Same por ĉiuj sekvantaj formuloj.

7/ Verŝajne la "bonaj homoj", tiuj kiuj estas nomitaj de nekatarismanoj la perfektuloj aŭ la puraj, kies greka vorto estas katharos, de kie venas la nomo de ilia spirita movado.

8/ Ne PIVa vorto kiu tamen enviciĝas en la franca-esperanta vortaro de R. Léger kaj A. Albault (Marmande: EFE, 1960, p. 448), kun signo kiu signifas ke la plejparto el tiaj vortoj troviĝas ĉe bonaj aŭtoroj kaj ŝajnis al la redaktantoj "indaj je atento".

Sankta Budho, preĝu por ni!

La legendo de la katolikaj sanktuloj Barlaam kaj Josafat (t.e. Budho)

Temas pri vera romano : " *Tiu libro, verkita en la 6-a jarcento de nekonatulo ie en Afganio, en lingvo nun mortinta antaŭ 1000 jaroj, diskonigis, pli malpli transformigante, ĉe ĉiuj civilizitaj popoloj ; kaj la rakontoj kiujn ĝi enhavas ĉarmis - post la budhistojn - la kristanojn, la islamanojn kaj la judojn, t.e. la preskaŭ tuto de la pensanta homaro.*" (1)

Budhisto(j), probable en Baktrio en la 6-a jarcento, verkis aŭ tradukis en la pehlevi-a (oficiala lingvo de la Sasanidoj, 226-652) libron pri "Yûdâsaf" (2). Kristano verŝajne ekpensis proprigi al sia religio la rakonton. Naskiĝis araba versio kaj eble unu (nur konjektita) en la siria, el kiu venus la georgia traduko ...kiun uzis la greka redaktanto !

Temas pri iu monaĥo Johano, sed probable ne sankta Johano Damaskano (al kiu ĝi estis atribuita ekde la 11-a jc.), el la monaĥejo "Sankta-Saba" en Palestino, en la unua duono de la 7-a jarcento (se ne antaŭe).

La greka teksto estis tradukita al la araba, el kiu ĉi-foje fontas du etiopaj versioj ; kaj estas ankaŭ unu armena versio. En la 13-a jarcento la hispana rabeno Ibn Chisdai verkis, en hebreaĵaj versoj, poemon pri Barlaam kaj Joasaph, titolitan La Princo kaj la Derviŝo.

Okcidentaj tradukoj

Unua latina versio, el la greka, estis konita en Eŭropo jam en la 12-a jc (verŝajne dank'al la Krucistoj), sed la "scienca" tradukinto de la greka teksto al la latina estas Jacques de Billy.

Rudolfo de Ems tradukis la legendon en la germanan ĉ. 1220 . En la 13-a jc aperis francaĵaj versioj (Gui de Cambrai, de Chardry...) ; kaj la dominikano Jakobo de Voragine (Giacomo de Varazzo, ĉ. 1230-1298, de Savona apud Ĝenova, Italio) enŝovis la rakonton en sian latinan "**Ora Legendo**" (latina titolo : Flos sanctorum, la flor(ar)o de la sanktuloj), kiun li redaktis ĉ. 1260 .

En la malnova angla ekzistas kvar mallongigitaj versioj, kaj en la norena (la malnova norvega), teksto el la 13-a jarcento. Fine de la 14-a ĝi fariĝis franca teatraĵo (Le Mistère du roi Advenir). Estas ankaŭ unu provenca teksto, du ĉefaj italaj versioj (plus poemoj kaj teatraĵoj), unu en la irlandia, multaj en la hispana, unu sveda traduko (15-a jc); kaj ankaŭ en la pola, la ĉeĥa... (3)

Kultita de la katolikoj

Oni trovas la sanktulojn Barlaam kaj Josafat en la okcidentaj martirlibroj almenaŭ ekde 1515 (4). En la 16-a jarcento, relikvo de sankta Josafat (ero de la dorsa spino) estis konservata en Venecio : en 1571 ĝi estis donacata al la portugala reĝo Sebastiano, kaj poste al la monaĥejo "Sankta-Savanto", en Antverpeno kie ĝi ankoraŭ konserviĝis komence de la 20-a jc en la preĝejo Sankta-Andreo (en la relikvujo "*de la 36 sanktuloj*" : ĉu ankoraŭ nun ?).

Kaj ili enviciĝas inter la sanktuloj de la roma martirlibro ekde 1583, ĉe la dato 27-an de novembro : "*Apud Indos, Persis finitimos, sanctorum Barlaam et Josaphat, quorum actus mirandos sanctus Joannes Damascenus conscripsit*". (Ĉe la Hindoj, najbaraj de la Persoj, [festo] de la sanktuloj Barlaam kaj Josafat, kies mirindajn agojn sankta Johano Damaskano skribis).

Malkovro de la vero

La unua kiu miris pri la similaĵoj inter la rakonto pri Barlaam kaj Josafat kaj la legendo pri Budho estis la portugala historiisto Diego do Couto en 1612 ; sed lia rimarko estis preteratentita de ĉiuj. Nur en 1859 la analogioj estis denove rimarkataj, de franco (M. Laboulaye) ; sed tuj sekvis detala komparado, de germano (F. Liebrecht), kaj diskonigo de italo (Emilio Teza), norvego (A. Holmboe) kaj ĉefe Max Müller ("*Budho fariĝis sanktulo de la Katolika Eklezio*").

En la gravega Dictionnaire de Théologie Catholique (Paris, t. II, 1905, kolumno 415-416), J. Van den Gheyn skribis :

" *De la teologia vidpunkto la esplorado pri la legendo de Barlaam kaj Josafat starigas duoblan demandon, tiun pri la konsekvencoj de evidenta eraro en la roma martirlibro kaj en la kulto de la katolika Eklezio, kaj tiun pri la doktrina influo de la budhismo sur la kristanismon (...)*

" *La sanktuloj Barlaam kaj Joasaph neniam ekzistis. La rakonto pri ili estas nura fikcio (...)* Se la erara enŝovo de la sanktuloj Barlaam kaj Josafat en la martirlibron (...) estas ĝene maloportuna, kiel ĉiu eraro en simila kampo, ĝi ne havas, en la realo, la gravecon kiun oni ŝajne volas, en certaj medioj, doni al ĝi. Baldaŭa revizio de la roma martirlibro probable malaperigos ĝin."

Sed oni povas ĝoji, de interreligia vidpunkto, ĉar post pli ol kvaronjarcento ili ankoraŭ ne estis forpelitaj el la martirlibro. (Ni ne povis kontroli, ĉu ankoraŭ nun ne ?) ; kaj do, iel Budho estis daŭre rekonata kiel katolika sanktulo !

...kvankam G. Bardy skribis en 1932 :

" Oni rekonas en ĝi [tiu rakonto pri Barlaam kaj Joasaph] ĉefe la esencan de la legendo pri Budho ; kaj fakte la legendo pri Budho liveris la temon por la rakonto pri Joasaph. En tiuj ĉi kondiĉoj, vane estus serĉi historian fundamenton por tiu historio. Ĝi ne estas alio ol transpono de malnova tradicio, kaj la sanktuloj kiuj estas ĝiaj herooj neniam ekzistis." (5)

Certe Barlaam mem ne ekzistis, sed Josafat, aŭ almenaŭ Siddhârtha Gautama de Kapilavastu, kromnomita la Buddha, jes ja ! Tute ne temas pri fikcia homo sed pri vere vivinta fondinto de religio, same kiel Jesuo de Nazareth.

Kaj se en la katolika litanio oni senprobleme alvokas : "sankta Abraham...", "sankta Isaako...", "sankta Jakobo..." kaj "sankta Moseo..." kvankam ankaŭ ili tute ne povas, historie, esti kristanoj pro sia antaŭkristeco, kial la katolikoj ne daŭrigus konsideri (kiel ili faris dum longaj jarcentoj) Josafat kiel sanktulon, eĉ se ili malkovris ke temas pri antaŭkrista sankta homo ? Kaj kial ili ne alvokus lin eĉ per lia pli konata nomo, do : "Sankta Budho, preĝu por ni !"

Tiel la katolikoj fariĝus eĉ iomete pli vere katolikaj, t.e. laŭvorte : universalaj.

Notoj :

La ĉi-apudan version ni esperantigis el du francaj tradukoj de la "Ora Legendo", fare de T. De Wyzewa (Perrin, 1923) kaj "G.B." (eld. Rombaldi, 1942 : la kursivaĵoj plejofte estas de tiu ĉi).

(1) Gaston PARIS, *Poèmes et légendes du moyen âge*, Paris, 1900, p.194 .

(2) Tiu nomo devenas de Bodhisattva : "En la skriba sistemo de la araboj la sama litero povas, laŭ ĉeesto aŭ neĉeesto de certaj diakritaj signoj, esti legata B aŭ Y", t.e. nia J ; do la origine sanskrita vorto povas esti transskribita Bûdsatf aŭ Jûdsatf. Oni trovas en la araba la formojn Bûdâsp, Bûdâshp, Jûdsasp, de kie venis Jûdasf kaj poste Juâsaf*, transskribita en la greka : 'Iôasaf... (* Vorto kiu, laŭ la araba aŭtoro de la *Ketab-al-Fihrist*, signas Budhon.)

(3) Propono pri esperantista kunlaboro : interese estus kompari ĉiujn tiujn versiojn, se (sufiĉe kompetentaj) esperantistoj pretus traduki ilin el sia lingvo, kvankam ili estas skribitaj en malnovaj lingvoj. Kaj la originan tekston (por okcidento !) el la greka povus traduki ekzemple Gerit Berveling ...se li konsentas !

(4) Tiu de Usuard ; kaj poste tiu de sankta Petro Canisius, eld. en la germana en 1562 de A. Walasser ; tiu de Maurolycus publikigita en Venecio en 1568. (En la greka Eklezio estas pli malnovaj mencioj).

(5) *Dict. d'Hist. et de Géo. Eccl.*, Paris, t.VI, kol.814.

Sanktaj Barlaam kaj Josafat, abatoj. (27-a de novembro)

Barlaam, kies vivon Johano Damaskano tre zorge skribis, konvertis al la kristana fido kun la helpo de la dia graco la sanktan reĝon Josafat.

Kiam la tuta Hindio estis plena je kristanoj kaj monaĥoj, aperis tre potenca reĝo, nomita Avenir, kiu forte persekutis la kristanojn kaj ĉefe la monaĥojn (...)

La reĝo Avenir ankoraŭ ne havis infanon. Sed al li fine naskiĝis filo kiu estis mirinde bela, kaj kiu estis nomata Josafat. Okaze de lia naskiĝo la reĝo kunigis nenumereblan homamason kaj celebriĝis grandajn oferojn ; kaj li kunvenigis 55 astrologojn, el kiuj li petis zorge esplori kia estos la destino de la infano.

Ili ĉiuj respondis ke li fariĝos granda per la potenco kaj la riĉeco ; sed unu el ili, pli saĝa ol la aliaj, diris : "Ho reĝo, la infano kiu naskiĝis el vi fariĝos tute tia sed reĝos super alia regno nekompareble supera ol la via, ĉar se mi ne eraras li estos unu el la princoj de tiu kristana religio kiun vi persekutas". La astrologo parolis ne per si mem sed per la inspiro de Dio.

Tion aŭdinte, la reĝo estis timigita ; kaj aparte en sia ĉefurbo li konstruigis belegan palacon kiun li donacis kiel loĝejon al sia filo ; kaj li donis al li kiel kamaradojn tre belajn knabojn, ordonante al ili neniam paroli antaŭ Josafat pri maljuneco nek malsaneco nek malriĉeco nek io ajn malĝojiga sed senĉese amuzi lin, lin distri tiel ke la menso de la infano, tute okupata de plezuroj, ne havu la okazon pensi pri estontaĵoj. Se unu el la kunuloj de Josafat malsanigos li devos esti anstataŭigata de alia, bonfartanta. Sed ĉefe li malpermesis iam menciigi la nomon aŭ la doktrinon de Jesuo Kristo. (...)

La princo Josafat edukata en la palaco fariĝis plenkreskulo kaj ricevis kompletan instruon en ĉiaspecaj sciencoj. Miranta ke lia patro tiel entenis lin, li demandis pri tio al unu el siaj intimaj servistoj, aldone dirante ke li estas tre malĝoja ĉar li ne rajtas eliri el la palaco kaj li perdas la emon manĝi kaj trinki. .

Informita pri tio, la reĝo afliktiĝis kaj sendis al li tre kvietajn ĉevalojn kaj permesis al li eliri en la kamparon, kaj li lokigis laŭlonge de lia vojo grupojn por aklami lin rekomendante ke neniu malgajigaĵo estu videbla de liaj okuloj.

Nu, Josafat iun tagon en unu el siaj promenoj, renkontis leprulon kaj blindulon. Konsternita *pro ilia aspekto* li demandis kio estas *kiuj ili estas kaj kio okazis al ili*. Kaj liaj kunuloj *diris al li*: "Tio estas malbenoj kiuj trafas la homojn". Kaj li *demandis*: "Ĉiujn homojn?" Ili respondis ne; kaj Josafat *diris*: "Ĉu oni do scias kiuj homoj estas tiel suferontaj?" *Kaj liaj kunuloj*: "Sed kiu povas koni la estontecon de la homoj?" Kaj Josafat *rehejmeniris* tute malserena *pro tiel nekutima spektaklo*.

Alian fojon, li renkontis homon *rompitan de la maljuniĝo* kiu havis la vizaĝon tute sulkitan je faltoj, la dorson tute kurbigitan, kaj kiu pene balbutis pro sendenta buŝo.

Tute mirigita li volis ekscii la kaŭzon de la stato de tiu maljunulo. Kaj kiam oni respondis al li ke tio okazis pro la granda nombro de liaj jaroj, li demandis: "Kaj kio estas la fino de la maljuniĝo?" Kaj oni respondis al li: "La morto". Kaj li *diris*: "Ĉu ĉiuj devas morti aŭ nur kelkaj?" Oni respondis al li: "Ĉiuj". Li *diris*: "Post kiom da jaroj ĝi okazas?" Kaj ili *diris*: "Malofte oni povas vivi pli ol okdek aŭ cent jarojn; poste venas la morto".

Kaj la juna Josafat, turnanta kaj returnanta ĉiujn tiujn *novajn* pensojn en sia koro, estis en granda *sekreta* malĝojego; sed antaŭ sia patro li *daŭrigis* ŝajni gaja *tre dezirante pligrandigi sian instruitecon pri kion oni kaŝis al li*. (...) *

Magiisto nomita Theodas** (...) venis al la reĝo (...) kaj *diris al li*: "Forigu de via filo ĉiujn virojn kaj metu ĉirkaŭ li nur belajn virinojn bele ornamitajn, por ke ili servu lin kaj loĝu kun li. Kaj mi sendos al li unu el la spiritoj kiuj obeas miajn ordonojn, por igi lin emi al malĉasteco; ĉar nenio povas logi la junulojn tiom kiom la eksteraĵo de virinoj (...)"

La reĝo do maldungis ĉiujn servistojn de Josafat kaj ĉirkaŭigis lin per junulinoj kiuj senĉese provokis lin al la peko de malĉasteco; kaj li ne povis vidi aliajn homojn, nek paroli nek manĝi kun aliaj ol ili. Kaj la malbona spirito sendita de la magiisto eniris lin kaj ekscitis en li grandan ardon kiun grandigis la vido de ĉiuj tiuj junulinoj. La princo komencis esti tre malkvieta (...)

Oni poste sendis al li personon kiu estis tre bela kaj filino de reĝo, sed kiu perdis sian patron; kaj kiam Josafat admonis ŝin, ŝi *diris*:

"Se vi volas ke mi forlasu la idolojn, edziĝu kun mi. La kristanoj ne abomenas geedziĝon, male, ili laŭdas ĝin: la patriarkoj, la profetoj kaj sankta Petro, la princo de la apostoloj, estis edziĝintoj."

(...) "Se vi volas kontribui al la savado de mia animo, konsentu pri unu peto kiu estas malgravaĵo; kuŝu ĉi-nokte kun mi, kaj mi promesas al vi ke je la aŭroro mi fariĝos kristana; ĉar se, kiel vi diras,

estas ĝojo por la anĝeloj kiam pekulo pentofaras, ĉu granda rekompenco ne estas ŝuldata al la kaŭzinto de konvertiĝo? Faru do kion mi petas de vi kaj vi savos mian animon."

Kaj ŝi forte ŝancelis lian firmecon*** (...) Kaj Josafat, vidante sin en tiom granda konfuzo ĉar li estis impulsata de la fajro de la karna deziro samtempe kiam la demono sugestis lin salvi la animon de tiu junulino, metis sin en preĝan spiritostaton, kaj endormiĝinte li vidis sin transportita en herbejon plenan de floroj, kie la folioj de la arboj plej harmonie murmuris kaj la aero estis aroma je plej dolĉaj odoroj; kaj li vidis ĉirkaŭ si vid-mirindajn kaj gust-delicajn fruktojn. Kaj estis gemornamitaj orseĝoj, kaj purakvaj riveretoj. Li poste eniris urbon kies muroj estis plakitaj per oro kaj radiis miraklan helon, kaj ĉielaj horoj aŭdigis tiajn kantojn kiajn neniam la orelo de mortulo aŭdis. Kaj li perceptis voĉon kiu *diris*: "Tio estas la restadejo de la beatuloj". Kaj kiam la gvidantoj de Josafat volis revenigi lin returne, li petis ilin lasi lin en tiel bela restadejo. Kaj ili respondis: "Vi povos reveni ĉi tien, sed ne sen peno, kaj vi devos venki vin". Kaj poste li estis kondukita en forpuŝe malbelan, infektaĵ plenan lokon, kaj voĉo *diris al li*: "Jen la restadejo de la malbonuloj".

Kaj kiam li revekiĝis, la beleco de tiu ino kaj de la aliaj inspiris plu al li nur la abomenon kiun oni sentas vidante la plej malpuran rubaĵon (...)

La reĝo, laŭ konsilo de liaj favoratoj, tiam donis al Josafat la duonon el sia reĝlando. Sed la princo aspiris nur al la dezerto*** (...) Josafat plurfoje volis ekfuĝi, sed la popolo retenis lin. Li fine sukcesis eskapi kaj, irante al la dezerto, li [survoje] renkontis malriĉulon al kiu li donis siajn reĝajn vestaĵojn kaj de kiu li prenis la ĉifonaĵojn por vesti sin (...)

Kaj Josafat restis [tie] multajn jarojn, praktika-danta ĉiujn virtojn kaj vivanta admirindan asketan vivon (...)

Josafat, kiu estis forlasinta la reĝlandon en sia 25-a jaro, vivis dum ankoraŭ 35 jaroj la ermitan vivon. Kaj li endormiĝis en paco (...) La reĝo Barahias tion eksciinte, venis akompanata de multnombra armeo: li alportigis kun la plej grandaj honoroj la korpojn de la du sanktuloj en sian ĉefurbon. Kaj fariĝis multaj mirakloj ĉe ilia tombo.

* Josafat estas konvertata kaj baptata de Barlaam, monaĥo vestmaskita kiel komercisto venanta vendi multevaloran gemon: aludo al Mt 13, 45-46? (...)

** Aŭ Theudas, laŭ DTC, t. II, kol. 411. Ĉu greka-sanskrita kunmetaĵo "servanto (dās) de Dio (theo)"? Do duontranspono de kutima hindua nomo? Nura hipotezo...

*** La legendo "forgesis" raportis ke la estonta Budho fakte edziĝis kun ŝi kaj havis unu filon, Rahula.

**** Kie ermite vivis Barlaam, la monaĥo kiu laŭlegende konvertis lin.

Buddhacarita de Aśvaghōṣa

Por situigi la jenan eltiraĵon (kiun la editoro de la sanskrita teksto rigardas kiel "unu el la plej gravaj de la tuta verko" *) : la juna princo kiu poste fariĝos la budha - la vekiĝinta - , unuafoje en sia vivo eliras el la reĝa palaco kaj surĉare alvenas al la reĝa ĉefurbo kie svarmas homoj por vidi lin ...ĉefe belaj virinoj kun vizaĝoj similaj al lotusfloroj...

बुद्धचरित अश्वघोष

॥ ३॥ २५-६२ ॥

कीर्णं तथा राजपथं कुमारः पौरैर्विनीतैः शुचिधीरवेषैः ।
तत्पूर्वमालोक्य जहर्ष किं चिन्मेने पुनर्भावमिवात्मनश्च ॥ १ ॥
पुरं तु तत्स्वर्गमिव प्रदृष्टं शुद्धाधिवासाः समवेक्ष्य देवाः ।
तीर्णं नरं निर्ममिरे प्रयातुं संचोदनार्थं क्षितिपात्मजस्य ॥ २ ॥
ततः कुमारो ज्ञर्याभिभूतं दृष्ट्वा नरेभ्यः पृथगाकृतिं तम् ।
उवाच संग्राहकमागतास्थस्तत्रैव निष्कम्पनिविष्टदृष्टिः ॥ ३ ॥
क एष भोः सूत नरो ऽभ्युपेतः केशैः सितैर्यष्टिविषक्तहस्तः ।
भ्रूसंवृताक्षः शिथिलानताङ्गः किं विक्रियेषा प्रकृतिर्यदृच्छा ॥ ४ ॥

इत्येवमुक्तः स रथप्रणेता निवेदयामास नृपात्मजाय ।
संरक्ष्यनप्यर्थमदोषदर्शो तेरेव देवैः कृतबुद्धिमोहः ॥ ५ ॥
रूपस्य हृत्तो व्यसनं बलस्य शोकस्य योनिर्निधनं रतीनाम् ।
नाशः स्मृतीनां रिपुरिन्द्रियाणामेवा ज्ञरा नाम येष भयः ॥ ६ ॥
पीतं क्षनेनापि पयः शिशुत्वे कालेन भूयः परिसृप्तमुर्व्याम् ।
क्रमेण भूत्वा च युवा वपुष्मान्क्रमेण तेनैव ज्ञरामुपेतः ॥ ७ ॥
इत्येवमुक्ते चलितः स किं चिद्राजात्मजः सूतमिदं वभाषे ।
किमेष दोषो भविता मनापीत्यस्मै ततः सार्थिरभ्युवाच ॥ ८ ॥
आयुष्मतो ऽप्येष वयःप्रकर्षो निःसंशयं कालवशेन भावी ।
एवं ज्ञरां रूपविनाशयित्रीं ज्ञानाति चैवेच्छति चैव लोकः ॥ ९ ॥

buddha-ĉarita / 3 / 25-62 //

aśvaghōṣa

kīrṇam tathā rāḡa-patham kumārah pāūrāj r vinītājh ŝuĉi-dhīra-veśājh /
tat pūrvam ā-lokja ḡaharṣa kim ĉin mene punar-bhāvam ivātmanaś ĉa // 1 //

puram tu tat svargam iva prahr(i)ṣṭam ŝuddhā-dhi-vāsāh samavekṣja devāh /
ḡīrnam naram nirmamire pra-jātum samĉodanārtham kṣitipātmaḡasja // 2 //

tatah kumāro ḡarajābhībhitam dr(i)ṣṭvā narebhjah pr(i)thag-ākri(i)tim tam /
uvāĉa sam-grāhakam āgatāsthas tatrājva niṣ-kampa-nivista-dr(i)stih // 3 //

ka eṣa bhoh sūta naro'bhjupetaḡ keśājh sitāj r jaṣṭi-vi-śakta-hastah /
bhrū-samvr(i)tākṣah ŝithilānatāngah kim vikri jājṣā prakr(i)tir jadr(i)ĉĉhā // 4 //

itj evam uktaḡ sa ratha-pranetā nivedajām āsa nr(i)pātmaḡāja /
samrakṣjam apj artham a-doṣa-darṣotāj r eva devājh kr(i)ta-buddhi-mohah // 5 //

rūpasja hantrī vjasanam balasja ŝokasja joni-nirdhanam ratīnām /
nāṣah smr(i)tīnām ripur indri jānām eṣa ḡarā nāma jajājṣa bhagnah // 6 //

pītam hj anenāpi pajah ŝiṣutve kālena bhūjah pari-sr(i)ptam urvjām /
krameṇa bhūtvā ĉa juvā vapuṣmān krameṇa tenājva ḡarām upataḡ // 7 //

itj evam ukte ĉalitaḡ sa kim ĉid rāḡātmaḡah sūtam idam babhāṣe /
kim eṣa doṣo bhavitā mamāpītj asmāj tataḡ sā-rathir abhj-uvāĉa // 8 //

ājuṣmato'pj eṣa vajah-prakarṣo nih-samṣajam kāla-vaṣena bhāvī /
evam ḡarām rūpa-vināṣajitrīm ḡānāti ĉājveĉĉhati ĉājva lokah // 9 //

* E.B. COWELL, Oxford : Clarendon Press, 1893 (Anecdota Oxoniensia), pref. p.x. Ni ne sukcesis konsulti tradukojn : francan de S.LEVI en Journal Asiatique ĉ.1890 ?, kaj anglan de E.H.JOHNSTON, Calcutta, 1936.

La Travivaĵoj de Budho

Kiel vi povas konstati, en sanskrito temas pri strofoj el kvar dekunusilabaj versoj (skribitaj po du sur ĉiu linio), sed ni tute ne provis verse redoni ilin : nura traduko estas jam sufiĉe malfacila ! (Tiu ĉi estas kiel eble plej proksima al la sanskrito).

1. Tiel ekvidinte antaŭ si la reĝvojon kovritan
de urbanoj disciplinitaj kun brilaj kaj inteligentaj mienoj,
la princo ĝojtremetis
kaj sentis sin kvazaŭ renaskiĝi.
2. Sed la dioj el la regno de la pura penso,
observintaj tiun urbon ĝojvibrigitan kiel paradizo,
igis kadukan homon aliri,
cele al ŝoki la filon de l' reĝo.
3. Tiam la princo, vidinta tiun ĉi, kriplan pro maljuneco,
kun korpo malsama ol [tiu de aliaj] homoj,
al la [ĉeval]kunigisto diris, atenta al la alvenanto,
kaj kun rigardo nemoveble fiksita ĝuste tie :
4. " Kiu estas, ho [ĉeval]instigisto, tiu homo kiu alproksimiĝas
kun blankaj haroj, mano alkroĉiĝanta al bastono,
okuloj kaŝitaj de la brovoj, korpo malfortika kaj klinita ?
Kial tiu difekteco ? Ĉu akcidento ĝia kaŭzo ? "
5. Tiel parolis la ĉarkondukisto :
" Konigis al la reĝofilo ankaŭ kaŝendan realaĵon
menskonzuzo provokita de la dioj,
kiuj ĝuste teksis senkulpan vidaĵon.
6. Detruantino de la korpa formo, ruinigo de la forto,
naskantino de doloro, malriĉa je plezuroj,
perdo de la memoraĵoj, malamikino de la sensoj,
estas ja tiu maljuniĝo, pro kiu tiu ĉi estas tordita.
7. Ĉar estis trinkita ankaŭ de li la lakto en la infaneco ;
post tempo, li fariĝis pli granda ; li ĉirkaŭenmoviĝis* sur la tero
kaj grade, fariĝinta belkorpa junulo,
grade li alproksimiĝis la maljunecon. "
8. Post kiam tio estis dirita, tremetanta
la reĝofilo diris al tiu instigisto :
" Ĉu tiu damaĝo estos ankaŭ mia ? "
Al li tiam la ĉaristo eldiris :
9. " Ties supereco super la energio eĉ de sanulo
nedubeble, per la povo de l' tempo, estas estonta.
Tiel, la maljunecon, ruinigantinon de la korpa formo,
la mondo ĝuste kaj konas kaj atendas. "

* Aŭ : "ĉirkaŭpalpis" ; ĉar manuskriptoj enhavas la varianton "parimr(i)ŝtam".

बुद्धचरित (२)

ततः स पूर्वाशयशुद्धबुद्धिर्विस्तीर्णकल्पाचितपुण्यकर्मा ।

श्रुत्वा ज्ञारं संविविज्ञे महात्मा महाशनेर्घोषमिवात्तिके गौः ॥ १० ॥

निःश्वस्य दीर्घं खशिरः प्रकम्प्य तस्मिंश्च तीर्णे विनिवेश्य चक्षुः ।

तां चैव दृष्ट्वा ज्ञनतां सहर्षां वाक्यं स संविय इदं जगाद् ॥ ११ ॥

एवं ज्ञरा हृत्ति च निर्विशेषं स्मृतिं च रूपं च पराक्रमं च ।

न चैव संवेगमुपैति लोकः प्रत्यक्षतो ऽपीदृशमीक्षमाणः ॥ १२ ॥

एवं गते सूत निवर्तयाश्चान्शीघ्रं गृह्णान्येव भवान्प्रयातु ।

उद्यानभूमौ हि कुतो रतिर्मे ज्ञराभये चेतसि वर्तमाने ॥ १३ ॥

अथाज्ञया भर्तृसुतस्य तस्य निवर्तयामास रथं नियन्ता ।

ततः कुमारो भवनं तदेव चित्तावशः शून्यमिव प्रपेदे ॥ १४ ॥

यदा तु तत्रैव न शर्म लेभे ज्ञरा ज्ञरेति प्रपरीक्षमाणः ।

ततो नरेन्द्रानुमतः स भूयः क्रमेण तेनैव बहिर्ज्ञगाम ॥ १५ ॥

अथापरं व्याधिपरीतदेहं त एव देवाः ससृजुर्मनुष्यम् ।

दृष्ट्वा च तं सार्थिमाबभाषे शौडोदनिस्तद्गतदृष्टिरेव ॥ १६ ॥

स्थूलोदरः श्वासचलच्छरीरः सस्तांसबाहुः कृशपाण्डुगात्रः ।

अम्बेति वाचं करुणं ब्रुवाणः परं समाश्रित्य नरः क एषः ॥ १७ ॥

ततो ऽब्रवीत्सारथिरस्य सौम्य धातुप्रकोपप्रभवः प्रवृद्धः ।

रोगाभिधानः सुमहाननर्थः शक्तो ऽपि येनैष कुतो ऽखतन्नः ॥ १८ ॥



tataḥ sa pûrvâśaja-śuddha-buddhir vistîrṇa-kalpâcita-punja-karmâ /
śrutvâ ḡarâṃ sam-viviḡe mahâtmâ mahâśaner ghoṣam ivântike gâūh // 10 //

niḥ-śvasja dîrgham sva-śirah prakampja tasmimś ca ḡîrne viniveśja çakśuh /
tâṃ çâjva dr(i)ṣtvâ ḡanatâṃ saharśâṃ vâkjam sa sam-vigna idam ḡagâda // 11 //

evam ḡarâ hanti ça nir-višeṣam smr(i)tim ça rūpam ça parâkramam ça /
na çâjva sam-vegam upâjti lokah pratjakśato'pîdr(i)śam îkśamânah // 12 //

evam gate sûta nivartajâśvân śîghram gr(i)hânj eva bhavân pra-jâtu /
udjân bhûmâū hi kuto ratir me ḡarâ-bhaje çetasi vartamâne // 13 //

athâḡñajâ bhartr(i)-sutasja tasja nivartajâm âsa ratham nijantâ /
tataḥ kumâro bhavanam tad eva çintâ-vaśah śûnjam iva pra-pede // 14 //

jadâ tu tatrâjva na śarma lobhe ḡarâ ḡareti pra-parîkśamânah /
tato narendrânumataḥ sa bhûjah kramena tenâjva bahir ḡagâma // 15 //

athâparam vjâdhi-parîta-deham ta eva devâh sasr(i)ḡur manuśjam /
dr(i)ṣtvâ ça tam sâ-rathim âbabhâşe sâūddhodanis tad-gata-dr(i)ṣtir eva // 16 //

sthûlodarah śvâsa-çalaç-çharîrah srastâmsa-bâhuḥ kr(i)śa-pându-gâtrah /
ambeti vâçam karuṇam bruvânah param samâśritja narah ka eśah // 17 //

tato'bravît sâ-rathir asja sâūmja dhâtu-prakopa-prabhavaḥ pra-vr(i)ddhah /
rogâbhidhânah su-mahân an-arthah śakto'pi jenâjśa kr(i)to'sva-tantrah // 18 //

Ĉar ni prezentas la originalan tekston en la nagari-a skribo, ni ne transliterigas ĝin laŭ la norma internacia sistemo, sed ĝin transskribas laŭ nia propra sistemo, iomete pli proksima al la esperanta prononco. Jen la ĉefaj diferencoj inter ambaŭ, laŭ la sanskrit alfabeto ordo :

r̥ > r(i) ; ṛ̥ > r(i) ; ai > âj ; au > âū ; ṁ > m̄ ; ḥ > h̄ ; ṅ > n ; c > ç ; ch > çh ; j > ĝ ; jh > ĝh ; ṭ > t̄ ; ṭh > t̄h ; ḍ > ḍ̄ ; ḍh > ḍ̄h ; ṇ > n̄ ; y > j ; ś > ŝ ; ṣ > ŝ . La sanskritscienculoj bonvolos, ni esperas, pardonu al ni. Kvankam nia sistemo ne distingas inter ŝ kaj ŝ, kaj teorie ebligas konfuzi ankaŭ ây (ekzemple el mâyâ) kaj ai (ekzemple el asmai), la konteksto, aŭ almenaŭ la supra origina nagari-o, ebligas ilin tuj scii pri kio ekzakte temas. (Noto sekvota)

10. Tiam, tiu antaŭdispozicie-pur-mensulo
havanta mult-eone amasigitan bonan karmon
aŭdinta tion, li, la Grandanimulo*, timegis la maljunecon
kiel bovino tondron de granda fulmo proksime.
11. Li suspiris** ; longe lia kapo tremetis
kaj la okulo fiksis sin sur tiu maljunulo ;
kaj rigardinte ĝuste tiun ĝojvibrantan homamason,
tiun ĉi parolon emociegita li diris :
12. " Tiel, kaj la maljuniĝo batas sendistinge
kaj la memoron kaj la korpan formon kaj la [viv]elanon,
kaj tamen la mondo ne turnas sin al tumultego
rigardante tian fakton tiom okulfrapantan ?
13. Pro tiu punkto al kiu ni tiel alvenis, instigisto, bonvolu turni la ĉevalojn
kaj rapide rekte hejmen ekiri.
Ĉar se mi anaŭenire aperus en tiu loko, kie estus mia plezuro
kiam la timo de maljuniĝo troviĝas en mia koro ? "
14. Kaj laŭ la ordono de tiu filo de reĝo
la [ĉeval]registro turnigis la ĉaron.
De tie la princo alvenis al tiu sama palaco
kvazaŭ [ĝi estus] malplena, influegata de sia zorgo.
15. Sed kiam li komprenis ke eĉ tie ne estis ŝirmo
konsiderinte atentege ke [ie ajn] "*maljuniĝo estas maljuniĝo*",
tiam, aprobita de la reĝo, denove
grade li iris eksteren sole.
16. Kaj nun ĝuste tiuj dioj kreis alian homon
kun korpo kaptita de malsano.
Kaj vidinte lin la Ŝuddhodanido***,
kun la rigardo iranta al tio, alparolis la ĉariston :
17. " Kun ŝvela ventro, pendantaj brakoj kaj ŝultroj,
senkarna kaj livida korpo skuata de sibla spiradaĉo,
la viro kiu ege alproksimiĝis
dirante "Patrino !**** kun lamenta voĉo, kiu estas tiu ĉi ? "
18. Tiam diris lia ĉaristo : " Dolĉa mastro, kio, fortega,
havas la potencon perturbi la korpan tavolon de la homo,
tiu grandega malbono nomiĝas malsano,
kaj ĝi eĉ kapablis farigi tiun ĉi malmemstara."

* Kvankam la esperanta vorto ekzistas (mahatmo), ni ĉi-tie tamen tradukis ĝin por provi sentigi la intence alproksimigitan ripeton de mahâ (granda) en la lasta kunmetaĵo de verso kaj la unua de la sekva: mahâtmâ / mahâŝanirghoŝam. Cetere la longa (supra) esperanta kunmetaĵo provas iomete redoni unu sanskritan kunmetaĵon sur preskaŭ tuta verso (la sekva eĉ konsistas el ununura kunmetaĵo) !

** Aŭ : "*li restetis senspira*", ĉar "*nih-*", kiel verba prefikso, ankaŭ povas signifi malaperon, detruon.

*** Unu el la nomoj de la estiĝonta Budho : "*Ido de Ŝuddhodana*", lia patro.

**** Parolmaniero per kiu (ankoraŭ nun) la almozpetantoj alparolas la gehomojn por igi ilin kompatemaj.

Konvertiĝoj en Nord-Norvegio (sekvo)

Antaŭ ol veni intervjui Mona*, matene mi "hazarde" renkontis survoje bluokulan junan norveginon kun fulardo sur la kapo kaj verda pluvmantelo : *"Unnskyld, er du islamisk ?"* ** Tiel komencis mia intervjuo kun Latifa Sayah, (nov)loĝantino de la insuleto kaj islamanino ekde 1983 ... kiu cetere havas hejme lernolibron pri esperanto ! Sed ŝi ne vere komencis lerni ĝin, preferante unue koncentri sin al la araba kiu, laŭ ŝi, ebligas ŝin esti komprenata ĝis en Ĉinio (kvankam ĝis nun ŝi fakte konas nur kelkajn vortojn krom la preĝoj) :

"Tio estas iomete kiel esperanto".

Ŝi vivis en la granda kolektiva domo kie alvenis la sveda paro. Ĉiaspecaj demandoj komencis leviĝi en ŝi pri la kialo de ĉio ajn kaj de la vivo : *"De kie venas la vento ... ?"* Ŝi sentis la bezonon trovi la perditan harmonion kun la mondo : *"Necesas ke mi preĝu, ke mi estu parto de la naturo ; necesas ke mi kliniĝu kiel herbo kiu kliniĝas en la vento : se ne, la planto rompiĝas."*

Ni ĵus sidiĝis sur la roko kiu tie alsurfaciĝis el la tero, en la ankoraŭ varma suno de tiu unua aŭtuna tago, escepta pro ties tute blua ĉielo ; la brizo dolĉe kurbigis la herbojn de la paŝtejoj kiuj malsuprenetendiĝis ĝis la malmultaj domoj kaj la blanka ligna preĝejo ; kaj kiel fono, la senonda maro kuŝis kiel lago antaŭ alia insulo tute proksima.

Ĉio estis tiel kvieta kaj paca, ke oni senpene komprenis ŝian deziron partopreni en tiu natura paco de kreitaro ĉi tie restinta preskaŭ virga, rekoni sin mem humila kreitaĵo inter la manoj de Dio.

Mona estis invitinta ŝin veni preĝi kun ili, ŝi estis hezitinta, eĉ ne konante la vortojn de la preĝo, recitata en la araba. Kaj ŝi fine akceptis, kaj trovis tie kio ŝajnas al ŝi perdita en kristanismo. (La preĝejo en Karlsøy estas cetere uzata nur unu aŭ du fojojn jare ; la pastorino, kiun ni ankaŭ vizitis, loĝas en la malgranda urbeto situanta sur alia insulo).

Kaj tiel ŝi tute nature fariĝis islamanino, samtempe adoptante la tutan konkretan kulturon : trovi la kontakton kun la nutraĵo manĝante per la fingroj, sidi surplanke sur tapiŝo anstataŭ altbliĝi uzante seĝon... Estas laŭ ŝi islama maniero plenumi la plej malgrandan ĉiutagan agon. Tio estas ja neniel deviga, sed ŝi prenis plezuron eniri iom post iom en tiun tradicion, la Sunaon. Ŝi trovis ne ŝanceblajn pacon kaj certecon. Islamo fariĝis ŝia Vojo "centprocente". Ŝi edziniĝis kun alĝeriano kaj ŝajnas vere feliĉa, kaj radianta. Ŝi miras pri la antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo pri la virinoj. Mi parolis al ŝi pri la franca epizodo de la malpermeso surhavi fulardon sur la kapo ĉe la lernejo ; kaj ŝi diris ke,

male, ŝi estis invitita tie paroli pri Islamo, ĉar ekzistas en Norvegio prireligiaj kursoj en la gimnazia instruo.

Kaj ilia rilato kun la aliaj enloĝantoj de la insulo, sufiĉe margenulaj ? La kolektiva periodo en Karlsøy estas nun pasinta. La granda domo, ekzemple, fariĝis ia pensiono-hotelo. Ĉiu vivas hejme en sia propra domo. Ŝia fido enkondukas neniun ŝanĝon en ŝia rilato kun la aliaj, krom la fakto ke ŝi sin detenas sidiĝi kun homoj trinkantaj alkoholon.

Kaj fakte ŝajnas ke la islamaninoj, post certa rezistetemo, komence, kontraŭ ili, fine estas bone akceptitaj sur la insulo pro tio ke ili tute ne provas konverti aŭ trudi ion.

Ili cetere devis adapti sian praktikadon al la norvega vivo. Ekzemple, kiam la Ramadanokazas meze de somero kiam dum du longaj monatoj la suno ne malleviĝas, ili permesas al si rompi la kutiman regulon kiu, normale, permesas manĝi nur inter la malleviĝo kaj posta leviĝo de la suno : ili alimaniere observas la tagan faston, donante al si la rajton manĝi inter la 10-a vespere kaj la 2-a matene, sub la fama meznokta suno.

Karlsøy estas do bela ekzemplo de reciproka toleremo : la solidareco de la novaj enloĝantoj venintaj repopoli la insulon ne estis rompita de la subita alveno de religio kiu tamen povis ŝajni minaca pro la kutimaj antaŭjuĝoj, preskaŭ same oftaj en Norvegio, ŝajnas al mi, ol en Francio kaj la resto de Eŭropo.

* Vidu n-ro 11, p.22 .

** *"Senkulpigu min, ĉu vi estas islamanino ?"* en la norvega, cetere kun eraro ĉar mi uzis la adjektivon anstataŭ la substantivo *"islamitt"*.

Islamo

Aŭtune 1992 estis fondita en Irano "Tutmonda Islama Movado Esperantista" (T.I.M.E.) .

T.I.M.E. eklaboris kun naŭ kunlaborantoj, kaj bonvenigos komentojn, kunlabor-proponojn, helpon kaj diversajn Esperanto-gazetojn, bultenojn, librojn de Esperanto-organizo, fakuloj kaj individuoj.

La fondinto kaj gvidanto de TIME estas S-ro Gholam R. Abadi, P.O. Box 345-63515, Bandar Mahshahr, Islama Respubliko Irano.

(Laŭ Eventoj n-ro 0023, februaro 1993, p.6) . Ni cetere mencias ke en la sama numero estis reproduktita sub rubriko "Interese..." (p. 8) , nia artikolo "Ĉu certe okazos la UK 1994 en Seulo ?". Dankon do al nia kolego!

"Taŭhid" de Muhammad Kahraman

2. La Unueco kaj Unikeco de la Kreinto

La distingaj trajtoj de individuaj aĵoj kaj identigaj markoj sur ĉiu, ĉiuj diferencoj rilate al vizaĝoj, voĉoj kaj lingvoj, ankaŭ ekzistas nur per Lia Kono kaj Saĝo. Estas signo en tio ĉi, de la Unueco kaj Unikeco de Alaho.

Ekzemplo de la vizaĝo

Dum ĉiu unuopa, izolita aĵo estas hezitanta, konfuza kaj senforma formo inter nenombreblaj eblaj manieroj, ĝi subite ricevas plej bonordigitan kaj saĝan aspekton de identeco, definitivitan indviduecon. Ekzemple, ĉiu homa vizaĝo havas siajn unikajn karakterizaĵojn kiuj malsamas de ĉiuj aliaj vizaĝoj, kaj tamen estas ankaŭ unueco en la maniero laŭ kiu ĉiu vizaĝo estas formita.

La unua kvalito estas elmontri de la Unikeco de la Kreinto dum la dua almontras Lian Unuecon. Tiu kiu ne konas, ĉiujn samtempe, la ekzaktajn kvalitojn de ĉiuj vizaĝoj ekde la unua homo ĝis la lasta, ne povas doni tian diferencigon inter ili.

Plue, la simileco mem de la vizaĝoj (t.e. du okuloj, du oreloj, nazo kun du truoj, buŝo ktp.) estas klara pruvo, ke la Unu kiu donas tiel perfektan formon al unu vizaĝo, ankaŭ donas iliajn formojn al ĉiuj vizaĝoj.

La diferencigo de la kreitaro estas la marko de la Unikeco de Alaho, dum la harmonio kaj kohereco en la kreitaro estas la marko de Unueco.

Ekzemplo de la soldato

Se [la kreo de] ĉiuj estaĵoj ne estas atribuita(j) al unu estaĵo, fariĝas necese, atribui [la kreon de] unu aĵeto(n) al nenombreblaj kaŭzoj, kaj tiam la ekzisto de unu aĵeto fariĝas same malfacila [e klariĝebla] kiel [tiu de] ĉiuj estaĵoj. Tiam frukto fariĝas same malfacila kiel la universo, fakte pli malfacila.

Ekzemple, ĝuste se la kondukado de unu soldato estas [samtempe] komisiita al cent diversaj homoj, cento da malfacilaĵoj okazas. Dum, se miloj da soldatoj estas donitaj al la direktado de unu oficiro, ili estas same facile kondukeblaj kiel unu soldato.

La koincido de multaj diversaj kaŭzoj en la kreado de unu aĵo estas malfacila je la mila potenco. Donita al Unu Ĉiopova Kreinto, krei ĉion estas same facile kiel krei unu [aĵon].

Ekzemplo de la partiklo

Se ĉiu partiklo ne estas oficisto de Alaho, aganta kun Lia permeso kaj sub Lia aŭtoritato, kaj se ĝi trapasas ŝanĝigadon sen Lia Scio kaj Povo, tiam ĉiu partiklo devas havi senfinan scion kaj senliman povon, ĝi devas havi okulojn kiuj vidu ĉion, vizaĝon kiu rigardu ĉiujn aĵojn, kaj aŭtoritaton

super ĉiuj aĵoj... Vere, partiklo, kvankam ĝi estas senpova kaj senviva, pro la fakto ke ĝi plenumas siajn devojn konscie kaj levas grandegajn ŝarĝojn, liveras decidan ateston pri la ekzisto de la Necese Ekzistanta Unu. Individuaj movoj kaj devoj de ĉiu partiklo estas la marko de la Unikeco de Alaho. Ili montras Liajn Absolutajn Volon kaj Povon. Dum la unueco en celo, la interrespondeco kaj kunlaborado de miliardoj da partikloj agantaj kaj reciproke reagantaj por servi al unu funkcio, estas la marko de la Unueco de Alaho kaj montras Liajn Absolutajn Scion kaj Povon.

3. La celo de la kreado

La Glora Kreinto de tiu universo igas Sin mem konata de la pensantaj estaĵoj pere de ĉiuj Siaj belaj verkoj, kaj donas al ili la altvaloran favoron de la vivo por ke ili Lin adoru kaj plene submetiĝu al Li. Por la plenumiĝo de Lia celo en la kreado de ĉiuj Mondo kaj Homoj, Alaho certe sendas senditojn por komuniki al ili Sian Volon, Sian Grandan Planon kaj Sian Ordonon ; por instrui al ili Siajn Nomojn kaj Atributojn ; por montri al ili la rimedojn atingi Lian aprobon kaj por instrui al ili la manierojn danki Lin kun ŝato de Lia Belaj Nomoj kaj iliaj manifestiĝoj.

La Kreinto de la mondoj dekoraciis la universon per senfinaj specoj de mirindaĵoj, kaj poste metis Siajn pensantajn kreitaĵojn en ĝin por ke ili moviĝu en ĝi por pripensi pri Liaj verkoj de beleco. Li, estante la Absoluta Saĝa, komunikiĝis al la spektantoj pere de Siaj Profetoj kaj revelacioj priskribantaj al ili la sencojn kaj valorojn de Lia kreitaro kaj Liaj mirindaj verkoj.

La Posedanto de la Mondo dotis la homon, la frukton de la kreitaro, per multaj kapabloj, kaj preparis ilin por komprenaj submetiĝoj kaj kulto. La homo fariĝas la frukto de la kreitaro pro la celo mem de ilia kreado tiel ke ĝi estas indikita en la Korano. Alaho diras en la Korano :

" Mi kreis la ĝinojn kaj la homaron nur por ke ili povu kulti Min. Mi serĉas nenian porvivaĵon de ili, kaj Mi ne petas ilin nutri Min." (Korano 51, 56-57)

Sed ĉar la homo estas tute turnita al la mondo kaj al la multego da ties objektoj pere de siaj memdeziroj, Alaho determinas por ili Leĝon de Alta Konduto kaj sendas Siajn Profetojn por montri la ekzemplon kaj transdoni Lian Leĝon.

Tiun maniere la homoj ne estas lasitaj al la ventoj de siaj deziroj kaj de la timoj de siaj negvidataj mensoj. Male ili estas direktataj kun saĝo al uzado de siaj donitaj kapabloj kaj deziroj laŭ la priskribitaj kaj plej utilaj manieroj sen iri al la ekstremoj kaj tiel ruinigi sian celon en tiu ĉi vivo kiel homoj. Iliaj pensoj kaj atento estas deturnataj de la multego al la Unu Kreinto, kaj de la transira kreitaro al la Eternulo.

(Vidu la sekvon p.29)

De la 17-a ĝis la 21-a de okt. 1992, mi partoprenis en internacia kolokvo en kastelo apud Compiègne (F). La temo estis *"Renkontiĝo de Kristanoj kaj Islamanoj : reciproka zorgo pri minoritatoj"*. La organizanto estis "Interreligious federation for world peace" (Interreligia federacio por monda paco), de New York.

Tri personoj gvidis la kunvenon : D-ro Clark, antaŭe profesoro ĉe la Gregoriana Universitato (papa) en Romo, nun estro de religiaj studoj ĉe la Malferma Universitato en Britio, kiu akompanis / gvidis la ĉiutagan programon, atentis pri la horo ktp. ; krome, de Islama flanko, D-ro Badawi, Ĉefimamo de Britio, kaj de Kristana flanko, M-ro Mouallem, Metropolito de la Melkita Eklezio (grek-katolika), antaŭe en Libano, nun loĝanta en Brazilo.

La partoprenantoj, ĉ. 24 entute, parte devenis el la politiko (ekzemple D-ro Al-Sharif el Jordanio, D-ro Hromadka el -tiam ankoraŭ- Ĉeĥo-Slovakio), parte el universitataj rondoj (Prof. Knappert de Londono, Prof. Bouimajdil el Maroko), parte el "eklezia/moskea" sfero (ekzemple Ajatolo Rouhani de Parizo, D-ro Basset el Svislando, de la Konferenco de Eŭropaj Eklezioj).

Estis vera travivaĵo, partopreni en tiel bunta grupo en la ofte tre malkaŝaj interparoloj. Anticipe ĉiuj devis prepari verkaĵeton de ok ĝis dek paĝoj pri religiaj minoritatoj en la regiono kie li/ŝi laboras. (Estas atentinde ke la solaj virinoj en nia mezo estis islamaj : unu psikologo, la alia direktoro de Calamus Foundation for Muslim-Christian-Jewish relations [fondaĵo por la rilatoj inter Islamanoj, Kristanoj kaj Judoj]).

Pro tio ke pluraj inter ni pasigis parton de la vivo en alia mondoparto ol kie nun ili loĝas kaj laboras, plurfoje aperis ofte interesaj reagoj de persono kiu unuavide oni ne opinius reagonta.

La enkondukoj kaj diskutoj, se diri ĝeneralige, temis pri Okcidenta Eŭropo, eta peco de Mez-Eŭropo kaj la Balkana regiono kune kun la tuta Mez-Oriento inkluzive Nord-Afrikan. Estissinsekvaj sesioj, ĉiam pri po difinita regiono.

Problemoj kaj defioj en la okcidentaj landoj ofte montriĝis tre similaj inter si, sed en detaloj tamen tre diversiĝis ; pri Mez-Oriento, same. Kompreneble la situacio en Bosnio estis speciale atentata, pro la teruraj murdoj, rabadoj, seksperfortoj kaj mistraktadoj, kiuj tie okazas sur la kaŝo de "religiaj malpacoj".

Unu el la plej grandaj diferencoj, mi nun pensas, de poste, pri kiu en nia parto de la mondo (Okcident-Eŭropo) oni ne tre multe pensas, kon-

cerne la minoritatojn kristanajn kaj islamajn en Okcident-Eŭropo kaj en Mez-Oriento, estas kompreneble la fakto ke ĉe ni kutime temas pri homoj kiuj mem venis ĉi tien kiel gastlaboristoj, aŭ iliaj familianoj, iliaj infanoj, dum tie temas pri minoritatoj kristanaj kiuj jam de pluraj jarcentoj loĝadas tie, ja eĉ plurajn jarcentojn pli longe ol la majoritato islama : ili ne havas iun t.n. "hejmlandon" kien ili povus formigri. La tuta situacio estas fundamente malsama pro tio.

M-ro Mouallem, ekzemple, rakontis ke siatempe la **Krucmilitoj estis granda katastrofo ne nur por la tieaj islamanoj, sed same por la judoj kaj la kristanoj. Ofte triope ili kune batalrezistis kontraŭ la krucmilitistoj - por ili entrudiĝintoj el Okcident-Eŭropo.** Estis tre senteble, precipe el la iam/tiam vortigitaj emocioj, kiugrade kaj kiel intense por multaj homoj - certe je Balkanio kaj Mez-Oriento - ankoraŭ apudas la epoko de la Krucmilitoj.

Ankaŭ la milito ĉirkaŭ Irako (Bush - Saddam Husajn) pere de radio kaj televido ĉefe sentiĝis kiel epizodo de Krucmilitado : ambaŭ kune kun siaj religiuloj apud si, televidekrane, petegantaj Dion pri Lia helpo ! Koncerne tion oni sin foje demandas kiam finfine finiĝos militoj, ja eĉ ĉu iam ajn entute ili povos finiĝi. La sola ekskurso kiun oni enŝovis en nian plenan programon kondukis nin en la arbaron apud Compiègne al la kopiaĵo de la originala trajnvagono en kiu siatempe oni subskribis la batalĉesigon kiu finis la unuan mondmiliton.

Post tio ni havis ĉirkaŭ tri kvaronhorojn por iomete viziti la urbon mem. En la buso, returnvoje, mi sidis apud la Ajatolo, kiu en persona interparolo (kompreneble franclingve) montriĝis esti persono multe pli afabla, ol en liaj oficialaj eldiroj estis senteble. Religie li estas sufiĉe ortodoksa.

Alia interesa afero estis la komuna manĝado. Ne estis disdonitaj por tio fiksitaj sidlokoj, tiel ke ĉiufoje oni altabliĝis en aliaj grupetoj. Tio liveris multajn eblojn por ideinterŝanĝoj. Kelkfoje estiĝis tute privata konversacio kiun eblis plilongigi ĝis la dumnokta tempo. Sed kutime por tio oni estis tro lacaj.

La tuton fine konkludis deklaro ampleksa, en kiu ni faris tutan aron da konkretaj proponoj, ekzemple laŭplane interŝanĝi docentojn inter teologiaj seminarioj kaj universitatoj, por ke kristanoj kaj islamanoj lernu pri la reciprokaj religioj ne nur per libroj, ofte verkitaj eĉ de eksteruloj por la religio, sed el viva instrua parolo de homoj kiuj mem estas aktivaj anoj de la koncerna religio. (En limigita kvanto tio jam komencis efektiviĝi inter Vatikano kaj Turkio).

Ankaŭ pluraj instigoj al registaroj enestas en la deklaro, por - kie necese - adapti la leĝojn (ekzem-

en Islamo

ple en Egiptio nuntempe kristanoj ne rajtas studi la araban literaturon ; en Ĉeĥo-Slovakio islamanoj ne rajtas havi imamojn, ĉar iliaj komunumoj estas laŭnombre tro malgrandaj laŭ la leĝoj) ; fine tre emfaza paragrafo pri Bosnio, en kiu ni konstatas ke neniel povas esti la intenco de Dio ke tie okazas tiaj krimoj - kaj ke **nek kristanismo nek islamismo predikas popolmurdon aŭ perforton** ktp. - unuvorte : ke ne temas pri religia milito, sed pri milito-sen-plie. Tiun deklaron oni sendis al la registaroj de Eŭropo kaj Mez-Oriento kaj al Vatikano, la Islama Koncilio kaj la Mondkonsilio de la Eklezioj.

Por fini, **rimarketon de mi kiel esperantisto** : la oficiala lingvo devis esti la angla, kiel anticipe oni informis nin. Sed dumkunvene montriĝis ke kelkaj ses aŭ sep homoj entute ne komprenis la anglan ; tiuj do plejofte uzis la francan. La franca estis la sola lingvo kiun ĉiu almenaŭ orele komprenis, sed paroli ĝin, ho estas alia afero. Kelkaj de temp' al tempo tute ne plu povis eldiri kion ili intencis, kaj sekve transiris al la araba, unu eĉ plurfoje al la turka. Tiukaze unu el la ĉeestantoj tradukis tion en la francan.

Ĉio kune : sufiĉe komplike. Sed ni tamen nin komprenis. Kio ja frapis min, estis la relative malalta nivelo, je kiu plurfoje ni estis devigitaj kontentiĝi. Depost kiam mi uzadas esperanton por internaciaj kontaktoj, tion mi ne plu tiel klare spertis. (Kun la Bosniano en la paŭzoj mi parolis germane : estis por li multe pli facile ol angle).

Entute : kelkaj tagoj plenstopitaj je impresoj ege riĉaj. Krom tio mi esperas ke mi retenos el ĝi kelkajn personajn amikecojn. **Gerrit Berveling**

(Sekvo de la paĝo 27)

Kiel ni vidas, la celo de la kreado estas tiel ligita al la laŭdegata Atributoj kaj Nomoj de la Glora Kreinto, kaj tia celo kun ĉiuj ties fruktoj apartenas al la Kreinto.

Malobeo aŭ forigo de pekoj, kontraste, estante ligitaj al malaltaj sencoj kaj en rilato kun nenieco, estas tre for ke ili estus la celo de la kreado.

Ni estu do ĉiuj certaj pri la jeno : La plej alta celo de la kreado kaj ties plej grava rezultato estas la kredo je Alaho (Imani billah) kaj je Liaj Belaj Nomoj en certeco (Marifetullah).

La plej brila feliĉo kaj dolĉa beno por la homo estas la amo al Alaho kiel rezultato de konsciiĝo pri la manifestiĝoj de Liaj Belaj Nomoj (Muĥabbetullah). La plej pura ĝojo por la homa koro kaj la plej vera plezuro estas submetiĝi al Alaho (Ibadullah, ittakullah).

Vere, ĉiuj vera feliĉo, puraj ĝojoj, dolĉaj benoj kaj serenaj plezuroj estas atingeblaj nur per submetiĝo al Li. Por ĉia alia celo, ĉio fariĝas sensenca, transira kaj destinita por neniĝo.

Pri la Preĝo de la Moraviaj Fratoj*

Propono de travivaĵo

La preĝo de la Moraviaj Fratoj disponigas rimarkindajn eblecojn sin internigi, sin rilatigi kun Dio, malfermiĝi al la spiritaj dimensioj, akcepti sin kiel homan estaĵon en humile teraj limoj. Kiam ĝi estas kantata, spirata, komprenata kaj sentata, ĝi ebligas sperti travivaĵon kiu havas tion ĉi apartan kaj esceptan, ke ĝi sumigas multajn kvalitojn, el kiuj la jenaj : La sono de la voĉo, harmonia, elsendas boninflujajn vibradojn (vidu la gregorian, ortodoksan ĉantojn, la mantrojn kaj *kīrtan*-ojn de Bharato...) ; la spirado, ĉefe en la longaj elspiroj, recentrigas kaj pacigas ; la simboleco de la paroloj kontentigas la menson ; la konscio, ege vigla, observas la fizikajn, energiajn, subtilajn sensacojn kiuj riveligiĝas.

Antaŭzorgoj pri la praktiko

Retiriĝi en izolitan lokon, kiu ne liveras distriĝeblon. Stari, sidiĝi aŭ instaliĝi en pozicio tiel nomata meditatada (*zazen, sejsa*, duon-lotusa aŭ tiel plu). Gravus esti senstreĉe, senĝene dorsrekta. Fermi la palpebrumojn. Aŭskulti sin spiri.

Ĉiu tuta muzika frazo estos kantata dum unu elspiro, sen laŭtigi la voĉon : temas pli pri murmuro.

Propono por la praktiko

1. Enradikiĝi en la tera dimensio : lokigi la konscion ĉe la bazo de la vertebra kolumno (*mūladhara ĉakro*). Kanti la unuan frazon : " **Ombro venas, tag' mortanta mondon adiaŭas** ".
2. Kantante la duan frazon : " **Per la preĝo koro Dion ekalproksimiĝas** ", suprenirigi la konscion ĝis ene de la brusto (*anāhata ĉakro*), ĝis la koro, loko de tenereco kaj amo.
3. Dum la 3-a frazo remalsupreniri en la abdomenon (*maṇipura ĉakro*) : " **En malhela, vasta preĝej', kiam dormas tero** ". Konscii pri "la preĝejo", kiun oni povas kompreni kiel la lokon ekster si, sanktan, kaj kiel la tutan videblan kaj nevideblan mondon.
4. Kvara frazo : - dum la unua parto, konsciencon en la abdomeno : " **Volas ni en ombro preĝi** " - dum la dua parto : ŝpruci ĝis malantaŭ la frunto (*āḡnā ĉakro*) : " **Dion ne dormantan** ".
5. Kvina frazo : lokigi la konscion super, trans la kapon, por ĉerpi al el la spiritaj fontoj, kaj kanti : " **Mia Di** ". 6. Fino de la preĝo : " **Kompategu nin ; falas ni surgenuen** ". Remalsuprenigi la konscion en sin mem kaj akcepti ĝin en sia tuta estaĵo.

La preĝo de la Moraviaj Fratoj helpas travivisian vivon laŭ du aksoj, unu, horizontala, tiu de la tera estaĵo, la alia, vertikala, tiu de malfermiĝo al la spiritualo kiu povas enkarniĝi. Tiel povas esti donita al ni travivi la staton de egalanimeco kaj de graco.

* Vidu ĝian tekston kaj muzikon en n-ro 10 p.18

Bahaa mondkongreso

La 22-an de novembro 1992 komenciĝis en la ĉeesto de la urbestro de Novjorko, S-ro David Dinkins, la kvartaga dua** bahaa mondkongreso kunvokita okaze de la centa datreveno de la forpaso de Baha'u'llah (1817-1892), profeta fondinto de Bahaismo.

Urbestro Dinkins kore bonvenigis la 27.000 bahaanojn el ĉ. 180 landoj, reprezentantaj praktike la tutan homaron, al sia urbo, kaj li oficiale deklaris la tagon kiel "tago de la bahaa mondkongreso". La ĉiutagaj ĉefaj sesioj de la kongreso (kiuj devis pro la amaso duoble okazi por po duono de la partoprenantaro) traktis esence la mirigan disvastiĝon de Bahaismo dum sia ankoraŭ nur unu-kaj-duonjarcenta historio.

La unua tago estis plene dediĉita al la memoro pri la sankta personeco de Baha'u'llah, kiu "pretendis esti neniu alia ol la Mesaĝisto de Dio por la epoko de homara matureco, la portanto de Dia Revelacio kiu plenumas la promesojn faritajn en antaŭaj religioj kaj kiu kreas la spiritajn nervojn kaj tendenojn por la unuiĝo de ĉiuj popoloj de la mondo", kiel tekstas en konciza enkonduko en la vivon kaj mision de Baha'u'llah, speciale publikigita okaze de tiu ĉi bahaa sankta jaro. (Tiu teksto estas tradukita al ĉiuj gravaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto; vidu ĝian recenzon en Asistilo numero 11, p. 24-26).

La dua tago estis dediĉita al la penetro de Bahaismo okcidenten el sia naskiĝejo en Persio dum la jaroj ĉirkaŭ la jarŝanĝiĝo kaj speciale al Abdu'l-Baha, la plej aĝa filo kaj posteulo de Baha'u'llah, kiu mem travojaĝis Eŭropon kaj Nordamerikon kaj en 1912 deklaris Novjorkon "urbo de l'Aĥdo***".

La tria tago memorigis pri la disvastiĝo de Bahaismo tra praktike la tuta terglobo dum la jardekoj post la dua mondmilito, kaj kiel kreiĝis plurmiliona bahaa mondkomunumo modelanta prototipe la pacan, tutmondan socion kiu laŭ bahaa konvinko nepre devas elformiĝi el la maladekvata kaj kriza aktuala stato de la homaro.

La lasta tago vidis i.a. persatelitan kunligon de tiu ĉi kongreso kun samtempe okazantaj malpli grandaj bahaa kongresoj en Sidneo, Apio (okc. Samoo/Pacifikio), Bukareŝto, Moskvo, Najrobio, Buenesajreso, Panamurbo, Novdelhio kaj Singapuro.

La ĉiutaga programo estis ornamita per grandioze bela muziko de orkestro kaj 400-persona koruso, kaj konsistis, apud prelegoj, el multaj diversaj aŭdvidaj prezentoj. La ĉefa lingvo estis la angla kun tradukoj al la franca, hispana, japana kaj persa - lingvoproblemo mirige ete sentebliis. La kromprogramo konsistis el multaj variaj koncertoj (i.a. klasika kaj ĵaza en Karnegihalo de Manhato), teatraĵoj kaj plej diversaj renkontiĝoj.

La partoprenoj forlasis la kongreson kun novaj inspiroj kaj refortigitaj plukonstrui sian unuecan, pacan, justan kaj tutmondan komunumon kaj kun nova entuziasmo konigi al siaj kunhomoj la konon pri Baha'u'llah, kiu venis, laŭ siaj propraj vortoj, por efektiviĝi la "bonon de la mondo kaj feliĉon de la nacioj".

BEL-aj TAGOJ

de la 26-a ĝis la 30-a de majo 1993
en Monki (apud Bjalistoko)

Ĝoje BEL (kune kun la Bjalistoka Esperanto-Societo kaj la Fondumo Zamenhof) invitas vin al BELaj Tagoj en Monki, 8.000-enloĝanta urbeto, ĉ. 40 km nordokcidente de Bjalistoko kaj facile atingebla aŭte, buse aŭ trajne.

Dum tiu ĉi seminario ni volas pli profundiĝi pri amo, geedziĝo kaj familio (per prelegoj, laborgrupoj, diskutrondoj ktp.). Krome la programo inkluzivos du ekskursojn, solenadon de bahaa festotago, distran programon kaj akcepton ĉe bjalistokaj esperantistoj en la ĉambro "Esperanto" de la porinfana hospitalo "Ludoviko Zamenhof" en Bjalistoko.

La seminario okazos kaj ni loĝos en la hotelo "Miejski - Gminny Osrodek Sportu i Rekreacji", strato Bialistocka 98, PL - 19100 Monki (tel: +48-85-16 25 95), kiu troviĝas iom enarbare, urborande (ĉ. 10-minuta promeno de la stacidomo, la sola hotelo en la tuta urbeto !)

Ne forgesu ankaŭ kunporti muzikilojn, kantojn kaj aliajn viajn ilojn kaj talentojn por pliriĉigi la programon.

Prezoj****: por okcidentuloj, 80 gld (surloke 100), por poloj, 300.000 zl (surloke 320.000). Bonvolu sendi aliĝon al BEL, B. Westerhoff, Ulrichstr.20, D-W-6000 Frankfurt 50 (tel +49-69-519845).

* Neneŭtrala paĝo je la respondeco de Bahaa Esp.-Ligo.
** La unua okazis en 1963 en Londono.
*** Bahaa termino signifanta la sanktan interligon inter Dio resp. la dia profeto kaj la homaro.
**** La kotizoj kovras sole la loĝadon en la hotelo. Maten- kaj verspermanĝojn ni mem preparos, kaj tagmanĝi ni povos en najbara restoracio (kalkulu por manĝelspezoj inter 200.000 kaj 300.000 zl., resp. 25 kaj 35 gld, por ĉiuj manĝoj).

Originalaj karakteroj de Oomoto - doktrino

La japanlingva originalo de ĉi tiu artikolo estas la teksto de la prelego kiun S-ro I. Deguĉi (Dir. de Departemento de dokumentado kaj kronikado) faris al la eksterlandaj misiistoj ĉe la Seminario organizita de la Religia Instit. de la Nacia Konsilantaro de la Eklezioj en 1986.



Oomoto havas du Gefondintojn, t.e. S-ino Nao Deguĉi, la Fondintino, kaj Majstro Onisaburo Deguĉi, la Kunfondinto ; kaj la Fundamentan Instruaron, kiu konsistas el "La Sankta Skribo" en 7 volumoj fare de Nao kaj "La Rakontoj el la Spirita Mondo" en 81 volumoj fare de Onisaburo. Krom ĉi tiuj verkoj, estas ankoraŭ multe da libroj (...)

Tamen mi nun havas tro mallongan tempon por klarigi la doktrinon kun ties tuta amplekso ; mi do volas limigi min per la eksplikado de nur kelkaj punktoj el la originalaj karakterizaĵoj.

La amplekso de la dikoncepto

Ĉe la komenco mi atentigas vin ke la dikoncepto de Oomoto estas tre originala kompare kun tiu de ekzistantaj eklezioj kaj sektoj en la mondo. Ĝi estas tre ampleksa, kun la ideo ke ĉiuj estaĵoj animitaj kaj neanimitaj, materiaj kaj nemateriaj en la universo, estas Dio aŭ manifestiĝoj de Dio, inkluzive ilian kreinton mem.

Jen nia Sankta Revelacio pri Dio, kiu tekstas : "La origino de la universo estas la Energio aŭ la Forto, kiu nome estas Dio". Tiun tekston sekvas la aserto : "Ĉiuj estaĵoj de la universo estas manifestiĝoj de la Energio, t.e. fragmentoj de Dio". Se la universo kaj ĉio kreita en ĝi estas manifestiĝoj de la Energio, de tio rezultas ke ĉiuj estaĵoj estas neforigeble konsistantaj partoj de la Dia Personeco.

Povas esti ke pluraj el vi trovas densan similecon de la dikoncepto de Oomoto kun tiu de la panteismo, sed mi certigas vin ke Oomoto ne estas identa kun panteismo.

Tri kategorioj

Religioj ĝenerale estas klasigitaj en tri kategorioj : monoteismo, panteismo kaj politeismo. Unu el la originalecoj de Oomoto estas ke ĝi estas klasigebla en neniu el ili, sed ĝi sin bazas sur ĉiuj tri.

Se oni volas nepre difini [ĝin laŭ] unu el la tri kategorioj, mi preferas diri ke Oomoto estas monoteismo. Mi tamen timas ke per tio oni atribuos al Oomoto la saman koncepton kiun havas la ekzistantaj monoteismaj eklezioj. Mi tial ne emas simple apliki la konvencian klasigon. Sed, se oni provizore difinu ke Oomoto estas monoteisma eklezio, mi devas aldoni ke ĝi sin bazas kiel sur monoteismo, tiel ankaŭ sur panteismo kaj politeismo.

Por pli klare komprenigi al vi nian doktrinon, mi plu eksplikos, citante por ekzemplo la nomon de Dio apoteozita en Oomoto. Ni alvokas Dion per la nomo *Oomoto-sume-Oomikami*. *Oomoto* signifas : la *centro, origino, fundamento, fonto* de la granda universo, aŭ la centro de la Dia Regno ; *sume*, laŭvorte : *regado*, t.e. unuecigo kaj regado de la granda universo fare de la unu sola Dio per Lia aŭtoritato ; kaj lastvice *Oomikami* estas la respekta titolo de Dio.

Kiel dirite, la nomo *Oomoto-sume-Oomikami* estas la respekta titolo oferata al la unu sola Dio laŭ la koncepto pri la ekzisto de unu Dio en la universo, kaj samtempe laŭ pli vasta koncepto pri la ekzisto de la dioj manifestiĝintaj el la emocio de Dio. La titolo do estas la nomo ĝeneraligita por Unu Dio aŭ la Origina Spirito kaj ankaŭ por la dioj aŭ partoj de la dia Estulo.

Starante sur la supre dirita koncepto, Oomoto disvolvas komunan adoradon kun diversaj religioj kaj sektoj, nome, de monoteismo kiel kristanismo, judaismo kaj islamo ; de panteismo kiel budhismo ; kaj de politeismo kiel hinduismo, ŝintoo kaj aliaj. La komuna adorado tute ne kontraŭstaras al la doktrino de Oomoto, sed ĝuste konvenas al ĝi (...)

La prapatra Dio de la mondo

La Dispirito kiu okupis la korpon de la fondintino Nao Deguĉi en 1892, estas la Prapatra Dio de la Mondo, Kunitokotaĉi no Ookami (vulgare Uŝitora no Konĵin). Tiu Dio rekte disiĝinta de la unu sola Dio de l'Granda Universo, estas la plej praorigina Dio de la mondo, kiu, kiel Ĝenerala Direktanto, prizorgas kaj protektas ĉion sur la tero.

Antaŭ longa tempo, post la kreo de la mondo, ĉi tiu Prapatra Dio degnis forlasi sian tronon, toleri retiriĝon en la nordoriento de la mondo pro la superregemo de "malbonaj dioj", kaj kaŝite protekti la terglobon dum eone longa tempo. La vorto *Uŝitora* signifas *nordoriento*, *Konĵin* signifas *Majesta Dio*. Do *Uŝitora no Konĵin* signifas *Majesta Dio ĉe la nordoriento*. Estas kredo ke tiu *nordoriento* de la mondo estas Japanio.

Kalendaro

De post la retiriĝo de la Prapatra Dio, la ordo de la mondo pli kaj pli konfuziĝis. La arbitra kaj egoisma maniero de administrado, neglektanta la leĝon de Dio, ŝanĝis la mondon en hombuĉejon, en kiu la plifortaj predas la malplifortajn. Se la mondo estos lasita laŭ tia maniero, ĝi perdos la lastajn spurojn pri harmonio kaj ordo, kaj la homaro pereos. Fronte tiun krizegon la Prapatra Dio de la Mondo, Uŝitora no Konĵin, remanifestis sin pere de Nao.

La Dio deklaris pere de ŝi : " *Ĉar amasoj da pekoj de bestuloj akumuligās sur la malluma nokta mondo, la Prapatra Dio faros drastan purigadon kaj rekonstruadon de ĉio sur la mondo kaj realigos surtere la Regnon de Dio, kiu prosperos por eterne. Prepariĝu por la nova Mondo ! La popoloj pentu kaj sin konvertu je pieco.*" El tio ĉi originis Oomoto [antaŭ unu jarcento].



Majstro Onisaburo Deguĉi, Kunfondinto de Oomoto

La Dispirito kiu penetris en la korpon de majstro Onisaburo Deguĉi estas nomata *Tojokumonu no Ookami* (vulgare : *Hicuĵisaru no Konĵin*) kaj estas la Edzina Dio de Uŝitora no Konĵin. Ĉar ĉi tiu estas speciale destinita reprezenti la Grandan Originan Dion en Ĉielo, Ŝi plenumas surtere la rolon de la mondsavado per la potenco de la Ĉiela Dio.

Laŭ la Oomoto-teologio ni nomas la Spiriton de la fondintino (Kunitokotaĉi no Ookami) la Prapatra Dio kaj kredas ke Li estas destinita starigi la eternan leĝon de Dio kaj plenumi la providencan planon ; kaj nomas la Spiriton de la majstro (Tojokumonu no Ookami) la Mondsavanto, kiu estas destinita savi la mondon konforme al la transirado de la tempo.

(Trad. Norija Esumi)

5-12 majo : (Anglalingve) **Dalai-Lamao*** en Britio:
- en **Cardiff**, la 6-an, prelego pri kompatato kaj universala respondeco ;
- en **Wembley** tritagata instruado pri budhismo kaj :
- la 10-an, prelego pri la povo de kompatato ;
- la 11-an, **interreligia renkontiĝo** inter kredantoj : "Defio por la homaro".

26-30 majo : BEL-aj Tagoj pri "*Amo, geedziĝo, familio*" en **Monki** (Pollando, apud Bjalistoko). Informas **Bahaa E-Ligo**, Westerhoff, Ulrichstr. 20, D-W-6000 Frankfurt 50, Germanio.

29-31 majo : (Franclingva) renkontiĝo de **islam-kristanaj** paroj apud **Parizo**. Informas (ankaŭ esperantlingve) : Ghislaine Bayod, 15 rue de l'Espérance, F-59132 Trelon. (Tel : 27 59 71 10).

9-13 junio** : Evangelia Eklezia Konferenco kun esperantaj diservo kaj informstano en **Munkeno**, Germanio. Informas : A. Burkhardt, Gimpelweg 1, D-W-7315 Weilheim/Teck. **** aŭ julio ???**

16-23 julio : Ekumena **KELI/IKUE** kongreso en **Viviers** (Francio, apud Montélimar). Informas : G.A. Héroux, Ecole St-Joseph, F-26400 Allex.

24-31 julio : UK en **Valencio** (Hispanio) dum kiu: **ASISTIa jarkunveno, Interreligia Kunveno Esperantista (IRKE)**, kaj duonhora komuna silentado.

26-30 julio : Someraj kursoj de **Martinus Centro** en **Nykøbing** (NL, 100 km nord-okc. de Kopenhago). Prelegoj interpretotaj en esperanto, kaj en la angla, germana kaj nederlanda ; same pri la studgrupoj. Temo : "*De besto ĝis homo*". Informas : Martinus Inst., Mariendalsvej 94-96, DK-2000 Frederiksberg

24.07 - 07.08 : **Katolika Esperanto-Tendaro** en **Sebranice, Ĉeĥio**. Informas : M. Svacek, Tršická 6, CS-751 27 Penčice.

1-7 aŭgusto : **Martinus** semajno 2. Same kiel supre. Temo : "*Kosmologio, arto kaj scienco*".

aŭgusto : (anglalingva) **Interreligia kongreso (IARF, WCRP...)** en **Bangalore (Hindio)** : centjariĝo de la *Monda Parlamento de la Religioj*. Informas : IARF, Dreielstr. 59, D-W-6000 Frankfurt, Germanio.

ĉ. pasko 1994 : **ASISTI-a seminario** en **Ĉeĥio**. Informas : B. Westerhoff (vidu adreson supre).

*La asocio de la budhistaj centroj de Dordogne (F) disponigas **vidbendon** pri **budhistaj instruoj** donitaj de la Dalai-Lamao en La Côte de Jor en aŭg. 1991. Prezo 290 FF (Secam aŭ PAL-sistemoj) +20 FF por la sendo; ĉe A.B.C.D., Laugera1, F-24290 St-Léon-sur-Vézère.